



# EL POPOLA ĈINIO

中國報

8

1980









Kunsido por la 30-jara jubileo de EPC

# jubileo de EPC

En la ekspozicio



Fremdlandaj specialistoj laborantaj en la Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Buroo en la ekspozicio





En la ekspozicio



Membroj de la Esperanta kurso de la Beijing-a Lingva Instituto en la ekspozicio



# EL POPOLA ĈINIO

1980

N-ro 8

(263)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

La ĉina virina flugpilka teamo

## SUR LA DORSKOVRILO:

Peonio

## KOLORA SERIO:

Okaze de la 30-jara jubileo de EPC

Anĵi, loko abunda je bambuoj

Fotografiaj verkoj de esperantistoj

Ĉinaj antikvaj muzikiloj

## NIGRA-BLANKA SERIO:

La ĉina virina flugpilka teamo

Tririkolta oranĝarbo

Okangula Pavilono

Plantido (Skulptaĵo)

Restoracioj de brogita kaj rostita ŝafajo

## Enhavo

Kunveno de Beijing-aj esperantistoj . . . . .	2
EPC kaj Ĉinio ekfloras . . . . .	4
Rememorante mian unuan viziton al Ĉinio . . . . .	5
Kial kaj kiel mi amas Esperanton? . . . . .	7
Sub homara flago . . . . .	8
La unua vizito de ĉinaj sciencistoj al Antarkto . . . . .	9
Pri la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato . . . . .	12
La Ĉina Virina Flugpilka Teamo en granda progreso . . . . .	14
Flugo al Pacifiko . . . . .	17
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	18
Kelkaj vidaĵoj sur la insulo Hainan . . . . .	19
Kelkaj vortoj pri la ĉina klasika poezio . . . . .	21
VIDINTAJ LOKOJ: Muzeo de bambuoj . . . . .	24
La dramo "Tetrikejo" . . . . .	26
Popola artisto — Lao She . . . . .	28
Mistera informkapablo de la homa korpo . . . . .	30
KULTURAJ NOTOJ . . . . .	32
Brogita ŝafajo de Beijing . . . . .	33
KALEJDOSKOPO . . . . .	35
AMIKECO: La statuo de antikva bonzo Jianzhen en Ĉinio . . . . .	36
Jianzhen . . . . .	38
KARIKATURO . . . . .	39
INTER NI: Kion mi vidis en la frenezulejo Anding? . . . . .	40
TRA ĈINIO: Baotou — ŝtala urbo sur la stepo . . . . .	42
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Fosilioj de prahomoj eltrovitaj en Ĉinio . . . . .	44
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	46
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	48

—◆—  
Ĝenerala distribuanto: Esperanta  
Sekcio de GUOZI SHUDIAN  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# KUNVENO DE BEIJING-AJ ESPERANTISTOJ

— Por celebrado de la 30-a datreveno  
de la fondiĝo de EPĈ




Hujucz, prezidanto de ĈEL, kaj Luo Jun, estro de la Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo, en la kunsido

**A**NTAŬTAGMEZE de la 22-a de majo Beijing-aj esperantistoj kunsidis en la pitoreska Beihai-parko, por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de EPĈ. Ĝin ĉeestis koncernaj respondeculoj, veteranaj esperantistoj aktive partoprenantaj en Esperanto-movado plurajn jardekojn, esperantaj laborantoj kaj esperantistoj laborantaj en diversaj branĉoj, entute 120 personoj. La kunvenantoj varme gratulis EPĈ-n pro ĝia sukceso kaj celebris pri la fruktoj akiritaj en Esperantaj libro-eldonado kaj disaŭdiĝo.

En la kunsido ĉefredaktoro de EPĈ Zhang Qicheng (Ĉ.Cen) raportis al la kunvenantoj pri la laboroj faritaj post la fondiĝo de EPĈ, mankoj ekzistantaj en ili kaj la farotaj laboroj. Li prezentis, en la nomoj de la Radio Pekino kaj la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, la Esperantan disaŭdiĝon de Ĉinio kaj la distribuadon de Esperantaj libroj kaj EPĈ.


Post tio, Hujucz, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris entuziasman paroladon. Li re-

trorigardis la sukcesojn akiritajn de niaj Esperantaj laboroj sub la zorgo de la Partio kaj la registaro post la Unua Tutlanda Esperanta Labor-kunsido de 1963, laŭdis la pliboniĝojn de EPĈ en la lastaj jaroj. Li kuraĝigis la redaktorojn plue klopodi por ke EPĈ pliboniĝu kaj pli bone servu al la legantoj kaj al la popolo de la mondo. Li emfazis, ke en la nova historia epoko la Esperanta laboro estas esperplena. Li esperas ke pli multaj novaj esperantistoj estos elbakitaj por probabla kunvoko de Universala Kongreso en Beijing.



Skribajo de Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, por la Esperanto-ekspozicio: Mi esperas, ke iun tagon en la estonto, Esperanto fariĝos komuna lingvo de la egalrajta kaj harmonia mondo sen ekspluato kaj subpremo.


Skribajo de Ge Baoquan, esploristo de fremdlanda literaturo: Ĉiam brilu la verda stelo de Esperanto, la simbolo de espero!







*Chu Tunan (la dekstra) kaj Wang Zhongfang, estro de la kancelario de la Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*



*Zhang Xiangshan, vices-tro de la Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*



*Ye Laishi (Ĵelezo), vic-prezidanto de ĈEL*

Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, konfirmis en sia parolo la noblan idealon kaj bonan deziron de la esperantistoj pri kreado de egalrajta, harmonia kaj solidara socio. Li laŭdis la rolojn ludatajn de EPĈ kaj de la Esperanta disaŭdigo de la Radio Pekino en akcelo de interkompreno kaj amikiĝo inter diverslandaj popoloj. Li diris, ke tiu progresiva afero de la homaro disvolviĝos multe kaj la nobla idealo kaj bona deziro realiĝos paŝon post paŝo, se la ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj klopodos sensanceliĝe.

Zhang Xiangshan, vices-tro de la Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estro de la Brodkasta Administracio de Ĉinio, retrorigardis en sia parolo la rolon luditan de la ĉina progresiva Esperanto-movado de la tridekaj jaroj en la ĉina revolucio kaj montris al ni la taskojn en la nova epoko. Li diris, ke estas necese por Ĉinio fari vastan interŝanĝon kun aliaj landoj en politiko, ekonomio,

kulturo, scienco kaj tekniko, interŝanĝon utilan al nia ŝtato, ĉar ĝi helpas nin krei internacian pacan medion por konstrui Ĉinion en modernan landon antaŭ la fino de la nuna jarcento. Li diris, ke Esperanto povas ludi bonan rolon en akcelo de interkompreniĝo kaj kultura, scienca kaj teknika interŝanĝo inter diverslandaj popoloj. Li esprimis sian esperon, ke EPĈ faros tiuflanke pliajn klopodojn.

En la kunsido ankaŭ veteranaj esperantistoj donis parolon. Ili gratulis la laborantojn de EPĈ kaj metis sur ilin sian fortan esperon. Wang Zhongfang, estro de la kancelario de la Propaganda Departemento de CK de KPĈ kiu laboris por Esperanto iam en la revolucia sanktejo Jan'an, diris: "En la malfacilaj jaroj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, niaj ekonomiaj kondiĉoj estis mizeraj, sed la Esperanta aktivado en Jan'an estis tre vigla. Tiam mi partoprenis en mimeografa eldono de Esperanta gazeto en Jan'an. La nuna bele presita EPĈ montras, ke nia Esperanta laboro multe disvolviĝis. Vidinte tion, mi estas tre emocia." Li salutis ĉiujn Esperantajn laborantojn. Luo Jun,



*Chen Yuan, vicprezidanto de ĈEL*

estro de la Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo, rememoris sian lernadon de Esperanto en karcero en tridekaj jaroj kaj esprimis sian bondeziron al niaj Esp-laboroj per Esperanto, kiun li ne uzis multjare sed ankoraŭ ne forgesis.

La fame konata tradukisto de fremdlanda literaturo Ge Baoquan faris altan takson al Esperanto en akcelo de kultura interŝanĝo. Li diris: "Frue en la komenco de la dudekaj jaroj, rusa blinda poeto Eroŝenko prezentis al la ĉina popolo sian verkon 'Rakontoj de Velkinta Folio (fabelo)' kaj esprimis senliman simpatian al la subpremata kaj suferanta ĉina popolo. En la periodo de la Kontraŭja-

pana Rezistmilito, japana esperantistino Verda Majo venis al Ĉinio, verkis 'En Ĉinio Batalanta' k.a. kaj, kune kun la ĉina popolo, oponis kontraŭ la agreso de la japanaj militaristoj. Niaj konataj esperantistoj, kiaj Hujucz, Ba Jin, Lu Yan kaj Sun Yong antaŭlonge tradukis literaturajojn de Rusio kaj Orient-Eŭropo pere de Esperanto en la ĉinan lingvon, samtempe ili konigis verkojn de Lu Sin, Guo Moruo kaj aliaj al la tutmondaj esperantistoj. Pro tio, Esperanto jam delonge estas ponto de amikeco kaj kultura interŝanĝo inter la ĉina kaj diverslandaj popoloj." Li diris, ke en la pasinteco EPĈ ludis aktivan rolon, kaj li kredis, ke estonte ĝi atingos pli grandan sukceson.

Ĵelezo, vicestro de la Komisiono de Reformo de Ĉina Ideografio kaj vicprezidanto de ĈEL, esperis en sia parolo, ke EPĈ akiros pli grandan sukceson en plibonigo de la enhavo kaj varbado de abonantoj. El sia multjara sperto li prezentis al EPĈ multajn valorajn proponojn. Chen Yuan, estro de Shangwu-eldonejo kaj vicprezidanto de ĈEL, salutis la junajn geesperantistojn, dirante: "Mi estas ĝoja, ke multaj junaj geesperantistoj aperis en nia trupo, ili estas nia estonteco kaj espero."

La kunsido estas plena de varma atmosfero kaj finiĝis en kantado de "La Espero".

La ĉina ŝtata Novaĵ-agentejo Xinhua dissendis enlande kaj eksterlande informon pri la kunsido kaj la Esperanto-ekspozicio, la Ĉina Centra Televizio kaj la Pekina Televizio konigis la kunsidon kaj ekspozicion, ankaŭ la Ĉina Novaĵ-agentejo dissendis informon pri ili.

## EPĈ kaj Ĉinio Ekfloras

**D**O EPĈ havas 30 jarojn. Dum 15 el tiuj jaroj mi estas ĝia abonanto. Ekde la komenco de mia lernado de Esperanto la bele presita gazeto allogis min. Unue mi devas konfesi ke ĝiaj buntaj kolorbildoj estas pli allogaj ol la teksto. Kaj nun mi ree pensas pri la pasintaj numeroj.

El ili mi ricevis fortan impreson pri la lando, kiu verŝajne alimaniere ne povus interesi min. Ĉar kiam mi komencis legi EPĈ, Ĉinio estis fermita en si kiel florburĝono, ne multe interesiĝanta pri fremduloj; aŭ ili pri ĝi.

Kiel dekstrulo en evoluanta lando, mi supozeble ne ĝuste akceptis la mesaĝon, kiun la redakcio intencis. Tamen mi gajnis impreson de belega, varia lando kun malriĉa sed laborema popolo.

Tiutempe la artikoloj montris naivecon, kvazaŭ celantaj al tute ne-edukita legantaro, kaj mi supozis ke la redakcio ne scias pri fremduloj.

Ĉio tio estis antaŭ 15 jaroj. Poste okazis la Kultura Revolucio. La gazeto spegulis iom konfuzan situacion. La dumonata eldonajo monatiĝis — oni ja faras grandan penon por plibonigi ĉion. Kaj eke oni ricevis, kune, kelkajn pasintajn numerojn. Kial? Ĉu ĉiu en la redakcio estas anstataŭigita kaj

neniu plu scias pri la agoj de la antaŭuloj?

La jaroj pasis kun eĉ pli naiva teksto kaj beletaj bildoj plenplenaj je ruĝaj flagoj kaj ridetantaj homoj. Ĉu mi reabonu la gazeton? Kompreneble jes! Eĉ se mi ne kredis la pozitajn scenojn aŭ interesiĝis pri la seninteresaj artikoloj, tamen la eldonajo spegulis nacion strebantantan al memkonscio, kaj spite al ĉiaj malfaciloj atingantan sukcesojn sen ekstera helpo.

Fine antaŭ 18 monatoj, kiam oni komencis scii eksterlande pri la malhelpo de la Kvarpersona Bando al tiom da aferoj en Ĉinio, EPĈ metamorfoziĝis. Kiel la florburĝono, Ĉinio ekmalfermis sin al la ĉirkaŭa mondo, kaj EPĈ denove spegulis la grandan ŝanĝon.

Ekde tiam la gazeto ĉiam pliboniĝas. La ruĝaj flagetoj kaj naivaj artikoloj malaperis. Veraj homoj nun ĝojas kaj laboras en ŝajne eĉ pli bela pejzaĝo. EPĈ, kiel Ĉinio mem, gastigas fremdulojn kaj donas interesajn informojn ĉiuspecajn.

Mi opinias ke landoj kun malsamaj socisistemoj ja povas kunlabori, kaj ĉi-okaze mi gratulas ambaŭ EPĈ kaj la grandan nacion, kiun ĝi prezentas al la esperantistaro.

Henry D. Palmer (Britio)  
15/4/80



## Rememorante mian unuan viziton al Ĉinio

**I**UN tagon frue de februaro, 1973, mi estis vizitata de S-ro Sirato Norio, ĝenerala direktoro de la Asocio de Japana-Ĉina Kultura Interŝanĝo. S-ro Sirato petis min, ke mi aliĝu al planita delegacio kiu vizitos Ĉinion por celebri la stariĝon de diplomatia rilato inter Japanio kaj Ĉinio efektivigitan en la antaŭa jaro. Li diris, ke la delegacio konsistas el 10 personoj reprezentantaj kulturajn kampojn en Japanio pri literaturo, muziko, kino, informado, teatro kaj Esperanto. Li atentigis min dirante, ke inter la delegacioj mi estas la sola kiun Pekina aŭtoritatularo rekte rekomendis aliĝi. La ceteraj estas elektitaj interne de la asocio. Verdire, en aprilo, 1971, mi ricevis leteron de la redakcio de El Popola Ĉinio subtenantan al mia sola vizito al Ĉinio, responde al mia propono, ke Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) akceptu viziton de japan-usona kuna grupo de esperantistoj. Informiĝinte, mi ekĝojis, ke mi baldaŭ povos vidi novan Ĉinion per miaj propraj okuloj kaj interparoladi kun ĉinaj esperantistoj. La kultura delegacio formiĝis kun D-ro Toki Zenmaro kiel estro. Feliĉe, ankaŭ D-ro Toki estas malnova esperantisto.

Por atingi Pekinon, nia aviadilo la 25-an de februaro vespere ekstartis de Guangzhou, kie ni pasigis 2 tagojn, sed mi renkontiĝis tie kun neniu esperantisto. Kiam ni surteriĝis ĉe

Pekina flughaveno estis jam ĉirkaŭ la deka, mallume kaj malvarmege ekstere. Pro mallumo mi ne povis diveni kiom da bonvenigantoj jam kolektiĝis. Ĉiu delegaciano alpaŝis unu post alia al ilia vico mansvingante por saluti kun ĉinaj vortoj "Ni hao" (bonan tagon).

Kiel esperantisto mi ankaŭ manpremis laŭvice dirante "saluton", "saluton", sed al mi revenis nenia Esperanta respondo. Kiam mi estis preskaŭ rezignanta, ĝuste tiam ekaŭdiĝis forta alvoko "bonvenon", "bonvenon" el la vico kaj mia mano estis firme premita sinsekve de ĉinaj esperantistoj. En tiu momento mi sentis en mi, ke vere Esperanta amikeca vojo inter Japanio kaj Ĉinio malfermiĝis. Ili estis

junaj esperantistoj laborantaj en la redakcio de EPC, la Esp.-sekcio de Fremdlingva Eldonejo kaj la Libro-servo de ĈEL. Mi neniam povas forgesi la kortuŝan renkontiĝon kiun mi spertis en la flughaveno de Pekino.

Dum dektaga restado en Pekino, krom oficialaj programeroj por ni aranĝitaj, mi povis aparte intervjui kaj diskutadi kun esperantistoj laborantaj en diversaj kampoj.

Por bonvenigi okazis du oficialaj bankedoj al ni. Nu, mi volas citi noblan ideon esprimitan en la parolado fare de S-ro Guo Mojuo ĉe la dua bankedo okazigita je la 5a de marto vespere. La bankedo malfermiĝis sub la aŭspicio de S-ro Guo Mojuo,

*S-ro Tokuda Rokuro kaj esperantistoj de Beijing, 1973*



vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj Honora Prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio; S-ro Liao Chengzhi, Prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio; kaj S-ro Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj Prezidanto de la Konstanta Konsilantaro de Ĉina Esperanto-Ligo. En sia bonvena parolado, S-ro Guo Moĵuo emfazis interalie, ke kultura interŝanĝo devas esti plivastigita ne nur en ĉina-japana rilato, sed ankaŭ en tutpacifika areo. Aŭdinte, mi tuj konjektis, ke S-ro Guo antaŭjuĝis la pozicion de ĉina Esperanto-movado en la venontaj jaroj kredeble en la 80aj. Tre bedaŭrinde, S-ro Guo Moĵuo forpasis en junio 1978 pro malsano. Fakte, japanaj malnovaj esperantistoj bone scias, kun amikeco kaj respekto, ke li aktive subtenadis Esperanto-movadon en Ĉinio kaj Japanio.

Reveninte al hotelo el la bankedejo, mi havis agrablan tempon ree interparoladi kun S-roj Hujucz kaj Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL. Dum la interparolado, S-ro Hujucz vigle kaj emocie klarigis al mi la situacion de Ĉina Esperanto-movado sub la kultura revolucio. Li diris, ke nun estas la tempo por reorganizo, kaj tio bedaŭre estus kaŭzinta miskomprenon aŭ maloportunon al esperantistoj eksterlandaj, sed kiam la reorganizo estos plenumita Esp-movado ree aktivigos kaj kontakto kun esperantistoj en aliaj landoj plivastigos. Priparolante Esperanto-movadon en Japanio, S-ro

Hujucz alte taksis la laboron faritan de Verda Majo dum malfacilaj jaroj en Ĉinio.

Pri la proponita kuna vizitgrupo de japanaj kaj usonaj esperantistoj, mi klarigis favoran kaj amikecan pozon de usonaj esperantistoj, interalie kiel S-ro William R. Harmon, Prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko "ELNA", Ges-roj William H. Schulze, UEA delegito kaj iama peranto de EPC. S-ro Hujucz opiniis, ke por estontecotia plano estas taŭga, sed portempe pro multnombro da vizitantoj la plano ne estas realigebla.

Profitante la okazon, mi prezentis peton sendi ĉinan delegacion al la 60-a japana kongreso de esperantistoj okazigota en Kameoka en somero tiujare. Ĝia transdono estis komisiita de S-ro Ito Eizo, Prezidanto de Esp.-Propaganda Asocio, kiam li vizitis mian domon antaŭ mia ekveturo. La peto estis akceptita por konsideri. Rilate al tiu temo, mi estis atentigita, ke dum lastaj jaroj ĈEL akceptinte la inviton de japana Esperantistaro sendis delegacion jam dufoje al Hongkong, kie ili atendadis vizon, sed ĉiufoje oni devis reveni Pekinon senvizite. Mi do kun granda bedaŭro pardonpetis klarigante, ke ne sufiĉe da kuraĝo batalinia flanke kontraŭ japana administracio kaŭzis tian rezulton.

Kiel promesite, en aŭgusto tiujare ĈEL sendis al la kongreso delegacion konsistantan el S-ro Ĵelezo, Vicprezidanto de ĈEL kiel estro, S-ro Ĉen Juan, Ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj S-ro Zhu Mingyi, sekciano de Fremdlingva Eldonejo. Ili estis varme bonvenigitaj en la kongreso. Ilia vizito ja alportis grandan kontribuon por fortigi amikecajn

rilatojn inter ambaŭlandaj esperantistoj kaj popolanoj.

Adiaŭinte al esperantistoj en Pekino, ni flugis al Ŝanhajo, kie Esperanto-movado brile prosperiĝis antaŭe. Dum 3-taga restado, mi proponis al revolucia komitato de Ŝanhajo, ke mi volas renkontiĝi kun malnova esperantisto S-ro Bakin. Li estas verkisto fame konata tra la mondo, kaj iama redaktoro de Esp-revuo "Verda Lumo" en Ŝanhajo. Kiel aliaj famaj verkistoj tiam li estis persekutata de la "Kvarpersona Bando", perdinte liberecon personan aŭ verki aŭ renkontiĝi kun aliaj. Malgraŭ mia ripetita peto la revo ne realiĝis.

Por ne malesperigi min, laŭ mia supozo, la urba revolucia komitato donis al mi ŝancon propagandi Esperanton al geknaboj kiam ni vizitis iun elementan lernejon. En tiu lernejo kun 1,600 lernantoj, oni instruis la anglan aŭ rusan kiel nedevigan lingvon al sesstudjaraj geknaboj. Antaŭ la geknaboj lernantaj la rusan lingvon, mi parolis sume kiel jene:

La plej vaste parolata lingvo en la mondo estas la ĉina, ĉar la popolanaro de Ĉinio okupas kvaronon de tiu de la mondo. Japanio havas pli ol cent dek milionojn da popolanoj. Ĉiu ĉino kaj ankaŭ ĉiu japano devas havi respekton kaj memfidon pri sia lingvo. En la mondo estas multaj landoj kaj ĉiu el ili havas sian propran lingvon. Mi informiĝis, ke Ĉinio jam starigis diplomaciajn rilatojn kun pli ol 90 nacioj. Vi ĉiuj fariĝos junuloj baldaŭ, ĉu vi pensas ke via scio pri la rusa lingvo sufiĉas por interrilati kun popolanoj de diversaj landoj? Mi rekomendas



# KIAL KAJ KIEL MI AMAS ESPERANTON?

Mi amas Esperanton. Sed kial? Kaj kiel? Mi komencu de Adamo!

Antaŭ 39 jaroj, la 25-an de decembro, osta, graveda montanino estis kolektanta branĉetaĵojn. Regis tenebro. Subite ŝi ekkriis, sinkis... Aŭdiĝis la unua ploro de bebo — mi naskiĝis.

La unuajn kvin jarojn mi pasigis en malsanoj. En la sesa jaro, mi jam devis svingi falĉileton, levi ŝpaton...

En 1949, fremdaj homoj en uniformo venis al nia vilaĝeto. Mi min kroĉis al la basko de la patrino.

— Ne timu! Ĉiuj viaj onkloj. — trankviligis min la patrino. — Ilin sendas prezidanto Mao, por doni al ni teron...

Mi levis la kapon. Jen kiel bela la suno! La tuta vilaĝeto baniĝas en sunradioj. La birdoj gaje dancas, la riveretoj lirle kantas.

Mi vizitis lernejon. Antaŭ la brusto flagris ruĝa kol-tuko. Mi

lernis diligente, mi vidis la novan mondon.

Somere de 1960, mi venis al la ĉefurbo, por lerni la rusan lingvon en la Beijing-a Universitato. Imagu, mi preskaŭ svenis de ĝojo. Malriĉula ido flugas de la sudo al la nordo, de kamparo al la vivoplena metropolo!

En 1964, ni devis komenci lerni la duan fremdan lingvon. Oni diris, ke iros lecionoj de tri lingvoj, la angla, la franca kaj — mi neniam aŭdis — la internacia. Kiun mi elektu? Oni diris, ke la plej facila estas tiu lasta. Mi do kaptis ĝin, ĉar mi jam preskaŭ elĉerpiĝis en la gramatika labirinto de la rusa lingvo. La unuaj lecionoj jam faris, ke mi tuj amis Esperanton.

Post kelkaj semajnoj mia amiko, lernanta la anglan lingvon, admonis: Esperanto estas nur artefarita ludilo, tute sen-senca. Vin turnu al la plej vaste uzata lingvo, la angla! Mi turniĝadis en la lito, maldormante. Ĉu Esperanto estas vera lingvo? ... ne perdu la tempon mel-

kante kaproviro! Mi ŝanceliĝis, mi rompis kun Esperanto kaj eklernis la anglan lingvon. Mi baraktis kontraŭ la prononco, lispis, balbutis...

Iutage mia instruisto alportis lernolibron "Elementa Kurso de Esperanto" verkita de Venlo Fon. Li solene eklegis: "Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."

Mi estis tute surprizita. Ĉiu vorto marteliĝis al mi en la kapon. Mi falis en mediton. Nia prezidanto Mao, tiel okupita en la militaj jaroj, taksis ankaŭ la internacian lingvon! Ĉu Esperanto utilas al nenio? Se tiel estus, kial nia prezidanto... Miaj okuloj ekbrilis. Mi revenis kaj forte brakumis la lernolibron, kvazaŭ ĝi estus mia amatino.

Estis oktobra tago, vetero bela. Veterana esperantisto Zensto gvidis tutan karavanon por fari amikecan renkonton

al vi ĉiuj lerni Esperanton krom la rusa. E-o estas facile lernebla, kaj apartenas al neniun lando.

Estis al mi granda ĝojo, ke hazarde mi povis fari propagandon pri Esp-o en la memorinda urbo Ŝanhajo.

Mia raporto finiĝas ĉienhave. Unu jaron poste, en aprilo 1974,

mi estis ree invitita viziti Ĉinion kiel membro de la vizitgrupo de japanaj esperantistoj. La grupo konsistanta el 8 esperantistoj estis estrita de D-ro Toida Naoki. En aŭgusto, 1978, mi faris triafojan viziton organizinte "Vizit-grupon al Ĉinio de Japanaj Amikoj de El Popola Ĉinio" konsistantan el 12 abonantoj. Ĉe

ĉiu vizito, amikeca rilato inter esperantistoj en ambaŭlandoj vidiĝas pliintimiĝanta kaj plivas-tiĝanta. Samtempe, malfacilaĵoj ĝenantaj por esperantistoj malaperas unu post alia. Nia sopiro renkontiĝi kun S-ro Bakin fine realiĝis en somero, 1978. Mi plezure legis raportoĵon pri tio en EPC, numero 12, 1978.

ELLA H. GIBSON (Usono):

## Sub homara flago

La naciaj muroj nin	Ĉiu homo partoprenos
Disigas tra la Mondo,	Egale en la festo,
Sed iam ĉiu gent' sin ligos	Kiel iu gastiganto
Al familia rondo.	En dom' de amikeco.
Tiam estos konstruata	Dume ni fidele fosu,
Daŭra pacalveno,	Tra la nuna tago,
Kaj la bela tero iĝos	Vojetojn por la alvenontoj
Komunumĝardeno.	Sub homara flago.

kun ni en la Somera Palaco. Oni prezentis diversajn programerojn, deklamis poemojn, rakontis fabelojn, tiel sorĉe, ke ili vekis en mi plian intereson por Esperanto.

En la sama tago mi skribis leteron al k-do Zensto. Li faris tuj respondon kaj invitis min al sia hejmo. La maljuna paro akceptis min afable. Zensto rakontis al mi pri la historio de la internacia lingvo kaj pri la vivo de Zamenhof. Kiel li dediĉis sian tutan vivon al la nobla idealo, al la bono de la homaro. . . La interna ideo min inspiris, la nova sento min altiris.

Mi vizitis ankaŭ k-don Laŭlum. Li parolis pri sia sperto en la studado, inicante min. Legu, kiel eble plej multe legu kaj praktiku.

Somere de 1965, mi venis al Radio Pekino por labori en la rusa lingvo. Iutage mi sciigis, ke en la Radio troviĝas ankaŭ Esperanto-sekcio. Kiel feliĉe, se mi povus labori per Esperanto! Kaj mi skribis leteron al la par-

tia komitato por montri mian deziron labori en tiu sekcio. Mi ne atendis, ke la komitato akceptis mian peton. Tiutage la superulo premis al mi la manon, kaj ridetis, kaj deklaris: Laboru energie kaj trankvile en Esperanto-sekcio! Mi ebriigis de ĝojo. Larmoj vualis la okulojn. . .

Mi sekvis la paŝojn de miaj kolegoj. Mi lernis de ili tajpadon, min ekzercis en tradukado. Mi posedis nesufiĉan provizon de vortoj. Cetere la memoro ofte min perfidas. Kion fari? Niaj antikvuloj diris: "Kiu volas, tiu povas." Mi surslipigis vortojn kaj parkerigis ilin survoje, antaŭ kunveno, dum laborpaŭzo, kaj eĉ en necesejo. Mi ripetis vorton unu, du, tri . . . milfoje. Mi volis esti diligenta kiel abelo, persista kiel formiko. Vidante ion, mi penis aperigi en la kapo la ekvivalentan nomon aŭ nocion en Esperanto. Tiamaniere mi posedis pli kaj pli da vortoj. Poste mi faris kun miaj kamaradoj rimaron kaj sinonimaron. Ni ekstraktis ĉarmajn

esprimojn kaj parolturnojn el 432 libroj, romanoj, poemoj, dramoj, fabeloj, eseoj k. a. eldonitaj en diversaj landoj, kio multe helpis min en lingvouzado. Nun mi laboras fervore kiel aliaj kamaradoj por konigi al niaj aŭskultantoj ĉion de nia modernigata kara patrolando, por la amikeco kaj paco. Kiam mi legas iliajn leterojn, min skuas ekstazo.

Poste mi revis pri familio el geesperantistoj. Mi patriĝis antaŭ unu jaro, kaj la kolegoj instigis: Baku denaskan esperantistinon! Sed iel, mi ne scias kiel, la filineto, nomata Revon, povas kompreni jam dekojn da Esperantaj frazoj, kaj la unua vorto, kiun ŝi kapablas elbusti, estas "koko" (ludilo) en Esperanto. Ĝojas la ses gejunuloj lernantaj ĉe mi la internacian lingvon — ili akiras multe pli da memfido, vidante ke la infaneto amuze gestas, mienas, pozas laŭ Esperantaj vortoj. Ĝojas la patrino de Revon, ankaŭ ŝi komencas balbuti, murmuri en la internacia lingvo.

# La unua vizito de ĉinaj sciencistoj al Antarkto

de XING HUA



Ĉinaj sciencistoj Dong Zhaoqian (la maldekstra) kaj Zhang Qingsong (la dekstra) esploras Casey-an ŝtonon kune kun d-ro K. Kerry, vicedro de la Aŭstralia Antarkta Buroo.

ĈE la suda fino de la terglobo troviĝas frosta kontinento kovrita de glacio kaj neĝo kaj ĉirkaŭita de oceanoj. Ĝi estas Antarkto — tre mistera kontinento en longa tempo. De la jaro 1902, kiam brita esploristo Robert F. Scott starigis tie la unuan sciencan esploran stacion, 11 landoj jam starigis pli ol 30 sciencajn esplorajn staciojn en tiu regiono.

## AL ANTARKTO

Januare de la kuranta jaro, laŭ la Ĉina-Aŭstralia Interkonsento pri Scienca kaj Teknika Kunlaboro la aŭstralia registaro invitis oceanfizikiston Dong Zhaoqian kaj geologon kaj geomorfologon Zhang Qingsong de Ĉinio viziti la stacion Casey de Aŭstralio en Antarkto. Je la 11-a de januaro, ili flugis de Christchurch de la suda insulo de Novzelando al la internacia aerodromo sur la glacibreto Ross,

transpasinte oceanon de pli ol 3,900 kilometroj post flugo de 9 horoj. La unua haltostacio sur Antarkto por ili estis McMurdo — la unua urbo de Antarkto. Tie troviĝas la plej granda scienca esplora stacio de Usono en Antarkto. En la urbo estas pli ol 100 konstruaĵoj, malgranda preĝejo, atoma elektrejo, marakvo-sensaliga fabriko, kiu povas liveri sensalan akvon sufiĉan por uzo de mil homoj, kaj hotelo por esploristoj kaj turistoj. La ĉinaj sciencistoj flugis al la stacio Casey je la 14-a de januaro, tiu loko sin trovas en la orienta parto de la kontinento (66.17 gradoj de suda latitudo kaj 110.32 gradoj de orienta longitudo) kaj distancas de McMurdo je 2,000 kilometroj.

## TERFORMO KAJ KLIMATO DE LA KONTINENTO

95% de la kontinento estas kovrita de glacio. Eĉ en la so-

mera januaro Antarkto ankoraŭ estas glacia mondo, rokoj vidiĝas nur ĉe borda regiono kaj la transversa montregiono.

Ĝia sudorienta parto estas ebena kaj la sudokcidenta forte ondanta, tie multas altaj montoj kaj vulkanoj. Starante sur la glacibreto Ross la ĉinaj sciencistoj jam povis vidi la aktivan vulkanon Erebus altan je 3,794 metroj super la mara nivelo, malproksiman je pli ol 30 km., la de ĝi elsprucigitaj fumo, sablo kaj ŝtonoj ŝvebantaj en forta vento aspektas kvazaŭ nigra drako longa je dekoj da km. Ĝi altiras al si multajn sciencistojn kaj turistojn.

Antarkto estas la plej malvarma kaj seka loko de la terglobo kun plej multaj ŝtormoj kaj plej fortaj ventoj. Ĝia jara meznombra temperaturo estas je 12° C malpli alta ol tiu de Arkto. Ĝia plej malalta temperaturo estas 88° C sub la nulo. La jara preci-



pitajo en ĝia borda regiono estas nur 200-300 mm. kaj tiu en la interna lando nur 30-50 mm. kaj preskaŭ egalas al tiu de Saharo. Tial oni nomas Antarkton Blanka Dezerto. Pro la sekeco kaj fortaj ventoj, incendi-preventado fariĝis tre grava afero en Antarkto. Ĉiuj laborantoj de la sciencaj stacioj devas akcepti trejnadon de incendi-preventado enlande, antaŭ ol ili venis al Antarkto. La antarkta klimato estas kaprica. Ventego, kies plej alta sekunda movrapideco estas 80-90 metroj, povas forporti tamburon plenan de benzino sur glacian monton foran je 10 km. Somere la marborda klimato estas kompare milda kaj malofte aperas ŝtormoj. La januara temperaturo meznombre estas ĉ. 0° C kaj maksimume 9° C. En sunbrilaj tagoj oni povas vidi kuraĝajn esploristojn naĝantaj en ĉeborda marakvo inter flosantaj glacipecoj.

Sciencistoj opinias, ke Antarkto havas gravan influon al la klimato de la tuta globo. Tial ĉiuj esploraj stacioj prenas meteorologian observadon kiel sian

gravan taskon. Ĉiutage la sudorientaj sciencaj stacioj de la kontinento sendas meteorologiajn materialojn al Casey, kiu transsendas ilin al Melbourne de Aŭstralio, kaj multaj landoj povas ricevi tiujn informojn de Melbourne en kelkaj horoj.

La dikeco de glacio sur tiu kontinento meznombre estas 2,000 metroj kaj maksimume atingis 4,800 metrojn. Glaciaj montoj, riveroj kaj krutaĵoj kun diverskoloraj algoj kreskantaj sur ili formis belan kristalan mondon. En sunlumo iuj ĉebordaj glacipecoj brilas smeralde, aliaj helruĝe. Rigardate de malproksime ili aspektas kvazaŭ lotusaj folioj kaj floroj, kaj pro tio ili ricevis la nomon lotusaj glacioj.

#### ANTARKTAJ VIVAĴOJ

Inter la animaloj de Antarkto sin trovas multaj specioj de maraj birdoj kaj bestoj. Tie estas tre multaj pingvenoj de ĉ. 20 specoj, kaj vivas grupe en miloj aŭ dekmiloj. Inter ili la reĝa pingveno estas la plej granda, kies alteco estas 1.2 metroj

kaj pezeco pli ol 40 kg. Pingvenoj iras balance kaj estas amin-daj pro la mallerta irmaniero. Kvankam iliajflugiloj estas malgrandaj, tamen pere de laflugiloj ili povas salti sur glacian krutaĵon altan je pli ol 2 metroj. Ili estas lertaj en naĝado kaj ĉiuhore povas naĝi 40 km.


Krome, Antarkton vizitas ankaŭ rosmaroj, fokoj kaj balenoj. Tie ne vivas surteraj birdoj kaj bestoj. En la antarkta oceano estas multe da eŭfosioj (*Euphausiid shrimp*), kiuj servas kiel ĉefa nutraĵo de marbirdoj kaj marbestoj.

Sur Antarkto ne kreskas floroj kaj arboj, sed prosperas verdaj muskoj kaj likenoj, kaj buntaj algoj inter glacioj kaj en marakvo, kiuj havas fortan vivipovon. Ĉiujare ili estas kovrataj de glacio dum 7-8 monatoj, tamen, kiam somero venas, ili kreskas prospere. Enirinte en la glacian mondon, oni sentas sin kvazaŭ en fabela kristala palaco.

#### NATURA EKSPERIMENTEJO

Ĉirkaŭ la antarkta oceano estas Radia Zono kaj Konverĝ-zono. La supra marakvo sude de la Radia Zono fluas suden kaj tiu norde de ĝi norden. La marakvo norde de la Konverĝ-zono estas alta en temperaturo kaj saleco kaj tiu sude estas malalta en la du flankoj. La loko estas natura laboratorio por esplori fizikan fenomenon de oceano. La Konverĝ-zono situas en la okcidententa zono, tie tutjare blovas 8-9-gradaj okcidenta vento. Kiam la ĉinaj sciencistoj traveturis tiun zonon, ilia ŝipo renkontis ondegojn altajn je 8 metroj, kaj pro tio la ŝipo devis

*Dong Zhaoqian observas pingvenojn.*



zigzage veturi antaŭen. La ĉefmaato de la ŝipo diris, ke foje li renkontis ondegojn altajn je 15 metroj. Registro montris, ke iam aperis ondegoj altaj je 30 metroj.

Ĉar la antarkta atmosfero ne estas poluciita kaj malmultas disiĝantaj korpuskloj, tie la konturoj de la steloj kaj la luno en somero estas tre klaraj. Antarkto ankaŭ estas ideala loko por observi astrojn kaj esplori la jonosferon, kosmajn radiojn, antarktan aŭroron kaj teromagnetismon. Ĉar tie la magneta kampo estas plej forta, kun 6,500-7,000 gamaoj.

### SINCERA AMIKECO

La ĉinaj sciencistoj ricevis en sia 45-taga vizito tre belan impreson pri Antarkto. Ilin kurtuŝis precipe la amikeco de la aŭstraliaj registaro kaj sciencistoj al ili. La estro C. Mcue kaj vicestro K. Kerry de la Aŭstralia Antarkta Buroo persone akompanis ilin en la vizito, donis al ili multan prizorgon ĉu en la laboro aŭ en la vivo. En la tago de la ĉina tradicia Prin-

*Post laboro sciencistoj de Aŭstralio kaj Ĉinio kune ludas flugpilkon.*



tempa Festo, kiam la ĉinaj sciencistoj eniris en la manĝejon, la aŭstraliaj amikoj gratulis ilin pro la festo unu post alia. En la vespera manĝo, la mastroj aparte farigis por ili grandan festan pudingon.

La ĉinaj sciencistoj tie pririgardis multajn lokojn. Dum la vizito la gastamaj mastroj ĉiam akompanis ilin kaj tre atentis pri ilia sekureco. Iutage, ili ekskursis al malgranda insulo. Subite venis tra raditelefono urĝa averto, ke la vetero tuj malboniĝos, kaj ke ĉiuj tuj revenu. La vetero de Antarkto

estas kaprica, prokrasto signifas danĝeron. La aŭstraliaj amikoj decidis, ke la ĉinaj sciencistoj unue revenu per helikoptero, kaj ili mem poste. Apenaŭ ili forlasis la insuleton, ventego ekfuriozis kaj nigraj nuboj kovris la ĉielon.

Dum la vizito al Antarkto, la ĉinaj sciencistoj intervidiĝis ankaŭ kun novzelandaj, usonaj, japanaj, anglaj kaj francaj sciencistoj kaj estis varme akceptataj de ili. La franca stacio eĉ hisis kvinstelan nacian flagon de Ĉinio kaj donis bankedon honore al la ĉinaj sciencistoj.

## Ni Kolektas Materialojn pri Verda Majo

Memore al Verda Majo, fama japana esperantistino kaj intima amikino de la ĉina popolo, ni eldonos Verkaron de Verda Majo. Nun ni estas kolektantaj ŝiajn verkojn, tradukaĵojn, fotojn ktp. Ni petas helpon de gesamideanoj kaj geamikoj, kiuj konservas materialojn de ŝi aŭ pri ŝi. Bon-

volu sendi aŭ pruntedoni al ni la koncernajn materialojn. Se vi ankoraŭ volas konservi la materialon, ni certe redonos ĝin post la uzado. Al ĉiuj sendintoj ni donacos la verkaron kaj al tiuj, kies materialon ni uzos en la libro, ni aldone donacos alian memoraĵon por esprimi nian koran dankon.

La Eldona Fakto de la Ĉina Esperanto-Ligo

P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

# Pri la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato

**L**A Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato en la urbo Hefei inter la riveroj Changjiang (Jangzi) kaj Huaihe en Anhui-provinco estas fama universitato kun multaj fakoj. En la kvieta korto de la universitato blokoj da domegoj elrigardas inter ombroriĉaj arboj.

Antaŭ nelonge, mi iris al tiu universitato kaj pririgardis ĝiajn klasĉambrojn, bibliotekon kaj laboratoriojn kaj ĉeestis postlecionajn aktivadojn de studentoj. La intensa lernemo en ĝi profunde min impresis.

Ĝi fondiĝis en Beijing (Pekino) en la jaro 1958. En 1970 ĝi translokiĝis al Hefei. Ĝia rektoro estis Guo Moruo (Guo Moĵuo), prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Kaj nomtabulo kun titolo de la universitato skribita

de li nun ankoraŭ pendas super la pordo de la universitato.

Dank' al la zorgado de la ŝtato kaj la subtenado de iuj famaj erudiciuloj kaj profesoroj en kaj ekster la lando ekde la tago de ĝia fondiĝo, ĝi disvolviĝis kaj perfektigis paŝon post paŝo. Nun, la universitato havas dekelkajn fakultatojn pri matematiko, fiziko, moderna kemio, moderna fiziko, moderna meĥaniko, radio, elektroniko, sciencoj pri terglobo kaj spaco, biologio, precizaj maŝinoj, scienca planado kaj scienco-mastrumado ktp. Ĝi prove starigis geknaban kurson kaj la Beijing-an instituton de esploristoj. La universitato havas pli ol 1,400 instruistojn, el kiuj troviĝas 72 profesoroj kaj vicprofesoroj kaj 583 lektoroj. Estas ankaŭ 68

praktikantoj kaj 124 esploristoj el la studentoj. Kaj multaj el la studentoj estis avangarduloj el mezlernejo.

Ĝi estas universitato dependa de la Ĉina Akademio de Sciencoj. En pli ol 20 jaroj, la akademio ĝin provizis per multaj aparatoj, ekipaĵoj, libroj, materialoj kaj instruistoj. Kaj multaj famaj sciencistoj havis postenon aŭ donis lekciojn en la universitato, kiel Wu Youxun, vicprezidanto de la akademio, kaj fizikisto Yan Jici, matematikisto Hua Luogeng, meĥanikisto Qian Xuesen kaj meteologo-geografo Zhu Kezhen.

La universitato havis esplorajn atingojn en multaj flankoj. Por helpi la eksperimenton pri "regata nuklea fuzio" de atoma energio, la fakultato de moderna fiziko de la universitato sukcese faris la unuan spektrometron de neŭtrala korpusklo de Ĉinio. Profesoro de la fizika fakultato diris, ke la eksperimentado de la regata termonuklea reaktoro bezonas altan temperaturon de 100,000,000°C. Per kia aparato oni povas mezuri tiel altan temperaturon? La spektrometro projektita sub la gvido de profesoro Xiang Zhilin povas per unu fojo aperigi la donitaĵojn de la temperatura mezuro. Personoj el la fakultatoj de tergloba kemio kaj matematiko, kune kun aliaj koncernaj sciencistoj, detale esploris

*Parto de la universitato*





per siaj scioj pri geologio, geokemio, izotopa geologio kaj matematika geologio, la kondiĉojn de formiĝo de magnetito ĉe Gongchangling en nordorienta Ĉinio kaj ĝiajn signojn kaj ekziston. Ili malkovris por nia lando grandan riĉan ferminejon.

En internacia simpozio, iu profesoro de la universitato publikigis sian esploran atingon kaj rikoltis laŭdojn de la ĉeestantoj. Li estas profesoro Fang Lizhi, vicestro de la esplora sekcio pri ĉielkorpa fiziko de la universitato. La verko pri ĉielaj korpoj, farita de li kaj fama itala erudiciulo, kaj liaj aliaj disertatoj altiris atenton de diverslandaj kosmografoj. Nun iuj landoj invitis lin por lektiado.

En la korto de la universitato mi vidis grandan elektronan sinkrotronon konstruatatan. Ĝi manifestis la leviĝon de la nivelo de sciencoj kaj teknikoj de nia lando.

Por frue trovi kaj kulturaj talentulojn, oni fondis en marto de 1978 geknaban kurson en la universitato.

En la tagoj de mia vizitado, mi ofte kontaktiĝis kun la geknaboj. Kiam ili ekvizitis la universitaton, meznombro ili estis malpli-ol-15-jaraj kaj la plej juna el ili estis apenaŭ 11-

jara. Ĝis nun tiu kurso akceptis sume 117 geknabojn je tri fojoj.

La geknaboj ĉiuj estas inteligentaj. En 1977, la 13-jara Ning Bo de Jiangxi (Gianghi)-provinco post testado eniris la universitaton. Antaŭe li estis lernanto de la Oka Mezlernejo de Ganzhou. 5-jara, li vizitis elementan lernejon, kaj en la 6-jara aĝo li sidis super libroj pri medicino, tiel ke li eksciis la funkcion kaj uzon de multaj drogherboj. Kiam li estis nur 8-jara, li eklernis astronomion kaj poste povis distingi dekojn da konstelacioj kaj konis ilian regulan ŝanĝiĝon en la kvar sezonoj.

Xie Yanbo, kiu antaŭe lernis en la 5-a klaso en elementa lernejo, ekvizitis la universitaton 11-jara. Jam en la elementa lernejo li memlernis la tutan matematikan kurson por la mezlernejoj. En la universitato li ĉiam tenis altajn poentojn. En la semestra ekzameno pri matematiko en la unua klaso li ricevis 100 poentojn.

La universitato ankaŭ starigis por la geknaboj kurson por helpi ilin koni la fakojn de la universitato kaj ilian aktualecon kaj la disvolviĝon de tiuj fakoj de aliaj landoj. Tiu kurso helpas la geknabojn koni ankaŭ la naturajn sciencojn kaj elekti plej interesan fakon. La universitato

provizis la geknaban kurson per elstara ĉefinstruisto kaj spertaj instruistoj.

Tre viglas la internaciaj sciencaj aktivecoj en la universitato. Dum la lastaj du jaroj, sciencistoj kaj sciencistaj organizoj el Usono, Britio, Francio, FR Germanio, Italio, Japanio, Svedio, Aŭstralio, Hungario, Ekvadoro kaj aliaj landoj vizitis la universitaton, lekciis aŭ instruis en la universitato. Inter ili estis famaj usonaj fizikistoj kaj Nobel-premiitoj Chen-ning Yang kaj Tsung-dao Lee kaj matematikisto Chih Kung Jen. Samtempe la universitato sendis homojn lekciis aŭ restudi en aliaj landoj, aŭ ĉeesti internaciajn simpoziojn. Ĝi rilatiĝis kun sciencistaj organizoj de iuj landoj por interfluo de sciencoj.

En nova domo lokiĝas la biblioteko de la universitato kun 500,000 libroj, el kiuj 200,000 estas fremdlingvaj. Multaj instruistoj kaj studentoj absorbiĝis tie en legado.

En la sportejo de la universitato okazis vetkuro. Iuj kuris, aliaj kuraĝiĝis. Bolis la tuta sportejo. Oni diris al mi, ke la sportoj de la universitato estas bone disvolvataj. La instruistoj kaj studentoj estas sciencaj laborantoj en laboratorioj kaj samtempe viglaj sportistoj en la sportejo.

*Instruistino helpas studentinojn en ilia lernado.*



*En legoĉambro de la universitato*




# La Ĉina Virina Flugpilka Teamo en granda progreso

**N**OKTE de la 9-a de majo, regis arda atmosfero en la Nanjing-a Sporta Halo. Tie iris la lasta konkurso de la Interna-

cia Virina Flugpilka Turniro — la konkurso inter la ĉina kaj japana teamoj. Iliaj brilaj ludoj vekis ĉe rigardantoj multan

aplaŭdadon. Per sia obstina lukto la ĉina teamo gajnis la unuajn du matĉojn kaj tuj poste per rapida kaj varia ofensivo, minaca startofrapo kaj lerte akorda blokado rompvis la fortan defensivon de la rivalo. En la daŭro de malpli ol 20 minutoj la ĉina teamo gajnis la lastan matĉon per 15 kontraŭ 6. Tiel la ĉina teamo gajnis la ĉampionecon de la turniro per ĉiuj venkoj en la kvin matĉoj. La japana teamo gajnis la subĉampionecon per kvar venkoj kaj la usona teamo la trian lokon per tri venkoj.

*Matĉo de la Ĉina kaj Japana Virinaj Flugpilka Teamoj*



La japana kaj usona teamoj estas fortaj teamoj en la mondo. Ili havas perfektan arton kaj riĉan sperton en internacia konkurso, dum la ĉina teamo estas debutanto. La trejnistoj kaj flugpilkistinoj de la japana kaj usona teamoj laŭdis, ke la ĉina teamo progresis rapide kaj estos gajnanto de la ora medalo en la venonta internacia konkurso.

La ĉina teamo reorganizigis post la Kvara Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio okazinta en septembro de 1979. La teamo konsistas el 12 membroj kaj du alternaj membroj, elektitaj el la teamoj de sep provincoj kaj municipoj. Inter ili troviĝas veteranaj sportistinoj partoprenintaj en mondaj konkursoj kaj ankaŭ junaj sportistinoj kun eminenta ludarto. Ili havas, meznombro, la aĝon de 22



jaroj kaj altecon de 1.78 metroj. La teamo havas 4 membrojn kun alteco de pli ol 1.80 metroj kaj ili estas la plej altaj el la aziaj flugpilkistinoj.

En la Monda Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso en la 60-a jaroj, la ĉina teamo gajnis nur la naŭan lokon. En la lastaj jaroj ĝi progresis relative rapide kaj foje-refoje atingis bonan sukceson en gravaj internaciaj konkursoj. En 1977 ĝi gajnis la kvaran lokon en la Dua Monda Flugpilka Pokala Konkurso, venkinte la japanan teamon, la tiaman ĉampionon, kaj la kuban teamon, la hodiaŭan ĉampionon. En 1978 ĝi gajnis la sesan lokon en la Oka Monda Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso kaj la subĉampionecon en la Oka Azia Sportkunveno. En la Tomispokala Internacia Virina Flugpilka Turniro okazinta en Rumanio en aŭgusto de 1979, ĝi venkis kvin teamojn inkluzive de la hungara teamo, gajninto de la kvara loko de la lastaj Olimpikoj, kaj gajnis la ĉampionecon. En la Dua Azia Flugpilka Ĉampioneca Konkurso okazinta en Xianggang (Hongkong) en decembro samjare, ĝi venkis la japanan kaj sudkorean teamojn respektive per 3:1 kaj 3:0 kaj gajnis la ĉampionecon, tiel ke ĝi rajtos partopreni en la finalo de la virina flugpilka konkurso de la olimpikaj ludoj. En la komenco de 1980, ĝi vizitis Usonon kaj faris matĉojn kun la usona teamo, unu el la kvin fortaj teamoj en la mondo, kun rezulto de ses gajnoj kaj unu perdo. La ĉina teamo altiris atenton de la monda flugpilkistaro.

Ĝiaj 14 flugpilkistinoj estas bone trejnitaj kaj havas perfek-

*Amikiĝis ĉina kaj usona sportistinoj*



tan arton, precipe ĉiu el la ĉefaj membroj havas sian fortan punkton. Ekz., teamestrino Cao Huiying, obstinema kaj brava, havas lertecon rapide frapi pilkon ĉe la loko 3 kaj distingiĝas per sukcesa blokado. En la Dua Monda Flugpilka Pokala Konkurso ŝi gajnis tri pokalojn de brava batalo, bona blokado kaj eminenta sportistino. La 19-jara Lang Ping kun alteco de 1.84 metroj estas la plej alta en la tuta teamo. Ŝi havas mirigan elastecon de salto. Post svingdona kurado, ŝi povas salte mantuŝi lokon altan je 3.17 metroj. Ŝi estas elstara ĉefatakestino. Personoj de la internacia flugpilka rondo titolis Flo Hyman el la usona teamo, Pomares el la kuba teamo kaj ŝin tri grandaj pugnatistinoj de la mondo. Zhou Xiaolan alta je 1.82 metroj montris sian talenton en la lastaj jaroj. Ŝi distingiĝas de la aliaj per rapida variema taktiko ĉe la meza

linio, viglaj movoj, perfekta arto en ofensivo kaj defensivo, ataka startofrapo kaj altprema blokado. En la Dua Azia Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso ŝi gajnis premion de la plej bona konduto.

La obstina stilo kaj alta arto de la ĉina teamo naskiĝis post diligenta ekzercado. Dum trejnado ili aplikis eĉ iujn metodojn por la vira teamo en startofrapado, transjetado, frapegado, antaŭbrakfrapado kaj blokado. Dum trejnado de unuopa aŭ para defensivo la trejnisto ĵetis la pilkon jen antaŭen jen malantaŭen, jen dekstren jen maldekstren, postulante ke ili rebatu la pilkon laŭeble. En la tago antaŭ la ĉifojaj turniro, ili faris intensan trejnadon de 7-8 horoj. Post tio ili elĉerpiĝis kaj soifis, sed neniu el ili plendis. Ili komprenas, ke por grimpi sur la teknikan kulminon ili devas peneme sin ekzercadi.



La kaŭzo, ke la ĉina teamo gajnis venkojn en iuj internaciaj konkursoj, kuŝas ankaŭ en tio, ke ili ĝuste analizis la trajtojn de si kaj la rivalo por uzi siajn superaĵojn kaj ataki la malfortaĵojn de la rivalo. Ili ofte rigardas en televidaj filmoj konkursojn inter eksterlandaj fortaj teamoj kaj okazigas artoanalizan kunvenon por lerni alies superaĵojn kaj forigi siajn mankojn. En tiu ĉi turniro ili alprenis malsamajn taktikojn kontraŭ malsamaj rivaloj kaj tiel rikoltis bonan rezulton. Mi prenu ilian konkurson kun la japana teamo kiel ekzemplon. Ekde la 60-aj jaroj ĝi gajnis sesfoje la mondan ĉampionecon kaj sesfoje la mondan subĉampionecon. Kvankam ĝi ŝanĝis siajn membrojn kelkfoje, tamen ĝi tenadis la mondan avangardan nivelon. Ĝiaj ludistinoj estas lertaj en kolektiva kunagado, rapida atako, forta defendo, perfektaj en individua arto kaj riĉaj je sperto en internacia konkurso. Ĝiaj sportistinoj estas meznombro je 5 centimetroj malpli altaj ol tiuj de la ĉina teamo. Tial, kvankam la


ĉina teamo estas malpli forta en defendo ol la japana teamo, tamen ĝi iom superas la lastan en atako kaj blokado, kio pretigas favorajn kondiĉojn por la ĉina teamo. Ĉe la komenco de la konkurso la ĉina teamo malordigis la taktikon de la rivalo per startofrapo ke la ĉefatakistino de la japana teamo forte ataku sen ŝirmado, kio favoris la ĉinan teamon por fari blokadon. La ĉina teamo sukcesis en siaj sinsekvaj startofrapoj de la longdistanca suprenfluga pilko kaj malfortigis ŝirmadon de la japana teamo en rapida atako. Kiam japana ludistino 1.62 metrojn alta troviĝis antaŭ la reto, la ĉina ludistino Lang Ping, profitante la superecon de sia alta staturo, faris superaltan frapon ĉe la loko 4 kaj bone ludis la rolon de ĉefatakistino. Zhou Xiaolan kaj aliaj tri ludistinoj prenis sur sin la taskon blokadi ĉe la lokoj 2 kaj 3 kaj samtempe kunagi kun la ĉefa atako per rapida atako. La transfrapistinoj de ambaŭ teamoj estis fortaj, tamen ĉe la ŝlosila momento efikis la subita atako de la ĉina teamo. En tiu

ĉi konkurso la taktiko estis bone aplikita kaj ankaŭ la superaĵoj de la ludistinoj estis uzitaj.

Estis malsama la konkurso inter la ĉina kaj usona teamoj. En la monda ĉampioneca konkurso la usona teamo iam gajnis la kvinan lokon, venkinte la ĉinan teamon per 3:1. Ĝi estas fama pro la alta staturo de siaj membroj kaj ilia forta atako. Tial la du teamoj konkuris pri rapideco, trafeco kaj forteco. La ŝlosilo de la venko konsistis en blokado kaj kontraŭblokado. La ĉina teamo alprenis varietan taktikon. Ĝi faris atakon jen fortan, jen rapidan, jen ŝajnigan, tiel ke la rivalo ne povis uzi siajn superaĵojn. Rezulte, la ĉina teamo venkis per 3:1.

Surbaze de plena disvolvo de sia arto, la ĉina teamo paŝon post paŝo formis sian apartan taktikon de rapida, variema, forta kaj ankaŭ dealta atako kun ofensivo kiel ĉefa rimedo. Ĝiaj veteranaj sportistinoj havas siajn apartajn superaĵojn, kaj la novaj sin aldonas senĉese al la teamo. Tial ili havas fidon krei novan rekordon en la venontaj mondaj konkursoj.

*Jurnalisto intervjuas la estron kaj trejniston de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo.*



# Ĉina Virina Flugpilka Teamo





Trejnistoj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo salutas spektantojn.

Diskuto pri taktiko







Pilkfrapistino Lang Ping




En trejnado



Cinaj kaj japanaj sportistinoj en parko







Matĉo inter la ĉina kaj usona flugpilkaĵ teamoj

Post trejnado

En amuzvespero





## Tririkolta oranĝarbo

Agronomiaj teknikistoj de Pupiao-komunumo de Baoshan-gubernio en Yunnan-provinco greftis oranĝarbon de Sichuan sur lokan arbon acida oranĝo kaj elkulturis novan specion, kiu trifoje donas fruktojn ĉiujare. La nove elkulturitaj oranĝarboj kaj floras kaj fruktodonas en marto, junio kaj decembro kaj ĉiu arbo povas doni pli ol 100 kilogramojn da fruktoj ĉiujare.

Oranĝarbo samtempe floranta kaj fruktanta

## Okangula Pavilono

La nomita pavilono kun kurioza formo ŝin trovas sur Jingzhen-monto de Menghai-gubernio de Ĉinio. Ĝi havas 8 angulojn, el kiuj ĉiu konsistas el 10 tegmentetoj viciĝantaj unu super alia ĝis la pinto de la pavilona tegmento alta je 10 metroj. Ĝia ombrela ĉapo el metala plato surhavas fajfiloformajn truetojn, kiuj povas eligi sonon je ekblovo de vento. Laŭ budhisma sutro de taj-nacieco, la nomita pavilono estis konstruita de antikvaj taj-aj budhistoj laŭ la formo de la ĉapo de la kreanto de budhismo Ŝakjamunio por lin memorigi.






# FLUGO AL PACIFIKO

— Raporto pri lanĉo de ĉina  
transporta raketo

*Je la 18-a de majo, 1980, Ĉinio sukcese lanĉis transportan raketon al Pacifiko. Tio estas alia grava atingo de Ĉinio en la avangarda scienca kaj teknika sfero post la sukcesa lanĉo de artefaritaj satelitoj kaj havas grandan signifon por rapidigi niajn kvar modernigojn. Ĉisube estas raporto de ĵurnalisto de Xinhua-novajagentejo.*

La Red.



*La raketo ekleviĝis.*

Apenaŭ elkrepuskiĝis kiam sur la lanĉejo de raketo jam regis streĉa atmosfero. Baldaŭ estis komencota la prova lanĉo de raketo.

La giganta skafaldo kun la lakta raketo en la mezo staris sur la lanĉejo. Diversfakaj inĝenieroj kaj specialistoj faris la lastan kontrolon al la raketo kaj tuj forlasis la lokon.

En la subtera kontrolĉambro la komandanto fikse rigardis la elektronan horloĝon, aŭskultis la raportojn de ĉiuj manipulantoj kaj faris ordonon: “Dek minutoj”, “Kvin minutoj”, “Unu minuto”... Kun la veno de la lastaj sekundoj ekfunkciis la diversaj spuradaj aparatoj, altrapidaj fotografiloj kaj bendaj registriiloj.

“Ekbruligu!” Je la ordono la juna manipulanto en la kontrolejo aplombe ekpemis la elek-

tran butonon. Kun terskua bruego la giganta raketo malrapide leviĝis en la ĉielon ŝprucigante flamon el sia postajo.

“Sukcese!” hurais la homoj rigardante la forflugantan fajran drakon.

Post kelkaj sekundoj la vertikale leviĝanta raketo komencis ŝanĝi sian direkton. Post kelkdek sekundoj la brulanta gaso ellasita de la raketo fariĝis nebulo, kiu etendiĝis sudorienten kvazaŭ blanka rubando. Iom post iom la raketo fariĝis brilanta punkto, flugis el la atmosfero kaj fine malaperis el vidkampo.

Sed centoj da kompletoj da modernaj komunikaj ekipaĵoj produktitaj de nia lando kaj instalitaj sur nia kontinento kaj la oceanaj mezuraj ŝipoj firme spuris la raketon kaj ekzakte mezuris, registris kaj raportis la rapidecon, altecon kaj staton

de la raketo. Ĉiusekunde granda kvanto da mezuraj donitaĵoj koncentriĝis al la interŝanĝa centralo de mezuraj donitaĵoj. Venis unu post alia ĝojigaj informoj: “Spurado bona!” “Laboro bonorda!” “Flugo normala!”...

En la kontrolo centralo, sur vicoj da televidaj ekranoj senĉese ŝanĝiĝis diverskoloraj numeroj, kaj la aŭtomata registriilo delikate pentris sur sia montra ekrano kurban fluglinion de la raketo, kiu tute konformis al tiu antaŭpentrita laŭ la teorio.

Trembrilis marakvo sur Pacifiko. Mezuraj kaj savaj ŝipoj kun flirtantaj kvinstelaj flagoj viciĝis ambaŭflanke de la destinita falejo de la raketo. Destrojeroj de la Popola Mararmeo patrolis ĉirkaŭ la ŝiparo kaj helikopteroj flugis en la bluan ĉielon por spuri la raketon en



kunagado kun diversaj mezuraj aparatoj sur la ŝipoj.

La raketo altrapide flugis al la destinita areo.

“Jen aperis la celaĵo!” Homoj rapidis svarme sur la ferdekojn kaj fikse direktis sian rigardon al nordokcidento. Post momento brilanta punkto flugis el nuboj, desegnante blindigan lumstrion, kaj falis rekte al la destinita marareo. La brilanta punkto fariĝis pli kaj pli granda kaj kiam ĝi estis je kelkmil metroj super la marsurfaco, la instrumenta kajuto entenanta

gravajn donitajojn de la raketo estis aŭtomate eljetita el la kapo de la raketo kaj malrapide falis kun malfermita paraŝuto. “Pum”! la kapo de la raketo falis en la maron kaj estigis altan akvokolonon. Kiam la instrumenta kajuto tuŝis la akvosurfaco, fluoreska tinkturo turnis la lazuran maron en pure verdan kaj la kolorigita marakvo belege aspektis kvazaŭ brodita rubando longa je centoj da metroj.

Tiam motorŝipo atendanta antaŭlonge en la ĉirkaŭaĵo sin pafis al la falejo kaj helikoptero

rapide flugis al la loko kaj ŝvebis en la aero je 30 metroj super la marsurfaco. Skafandristoj-soldatoj descendis en la maron laŭ la pendanta ŝtuparo kaj sukcese elakvigis la instrumentan kajuton en nur 5 minutoj kaj 20 sekundoj. La helikoptero portis la kajuton al la fluga ferdeko de la savŝipo.

Plene sukcesis la lanĉo de la ĉina transporta raketo de la ĉina kontinento al Pacifiko. Laŭte fajfis la ŝiparo, flirtis koloraj flagoj kaj ĉiuj ĉeestantoj saltadis kaj huraadis sur la ferdekoj.



\* S-ino Maroelle DESCHAMPS, 33 Rue Rameau, 24100 BERGERAC, Francio, kun unu el ĉinaj geesperantistoj pri edukado de infanoj.

\* Bd. Magheru, 32-36, Sc. A, Et. V, ap. 32, Bucurest, sect. I, R. S. Rumanio, studentino, deziras korespondi esperantlingve kaj ĉine kun ĉinaj fiologoj-gestudentoj pri ĉinaj lingvo, literaturo, teatro kaj pentrarto.

\* Mara Sabina Popa, str. Litoralului, n-ro 9, Bucurest-11, R-72451, R. S. Rumanio, deziras interŝanĝi bildkartojn kun ĉiulandanoj.

\* Piamarta Sebastiana, Via Nicolo Franco 21, I-31100 Treviso, Italio, deziras korespondi kun ĉina esperantistino.

\* Victoria Isabela Popescu, str. Columbelor nr. 7 ap. 1, Sector 4, 70098 Bucuresti, Rumanio, deziras korespondi kun esperantistoj el la

tuta mondo pri jogo kaj vegetarismo.

\* Karlo Marjo Vaggas A., Barrio las Camelias, Calle 30A no. 20-39, Calarca, Quindio, Colombio, deziras korespondi kun ĉinaj geesperantistoj.

\* Andrzej Marszalkowski, Skrytka pocztowa 254, PL 80-958 Gdansk-1, Pollando, kor. kun ĉinoj de diversaj urboj.

\* Kryslyka Kaloluksta, 16-17-jaraj knabinoj el mezlernejoj, 75-346 Koszalik, ul. Hladystawa IV-90 24m24, Pollando, dez. kor. kun esp-istoj tutmonde pri deversaj temoj.

\* S-ro Jan Slowinski, 28-j., ul. Krakowska 3/30, PL-44-335 Jastrzebie ZDR. Pollando, dez. kor. kun geesp-istoj tutmonde precipe kun ĉinoj.

\* Henrik Wissing, pensiulo, Norregade 27, DK-8783-Hornslyd, Danlando, kun ĉina esp-isto.

\* Vladimir Puškaš, Vojvodinaput, 25001 Somboe, P.F. 46, Jugoslavio, kun ĉina esp-isto.

\* Magnani Duilio, 50-j. Pastro, Viale Carlo Zavagli, 73, 47037 Rimini, Italio, kun ĉina esp-isto.

\* Zvonko Taborsky, 24-j. jurnalista, kun ĉinaj geamikoj k tiuj de aliaj landoj pri diversaj temoj kaj interŝ. bk. Adr. Moše Pijade 152, YU-43500 Daruvar, Jugoslavio.

\* Marita Seppanen, Tervolantie, 73100 Lapinlahti, Finnlando (19-j. knabino), kun amikoj tm.

\* Gejunuloj 10-17-j., dez. kor. tutmonde. Adr.: Osnovna skola “Ranko Orlic” Split, Blatine 33, Esperanto-sekcio, 58000 Jugoslavio.

\* Elizabeta Leonoviĉ (28-j. inĝenierino), str. Jagiellonska 12/53, 10-271 Olsztyn, Pollando, kun ĉinaj esp-istoj.

\* A. Lagoutte, Le Hameau au Soleil, 66700 Argeles-plage, Francio, kun ĉinaj geesp-istoj.

\* Doris Kleinschuter, Fultanstrasse 5-11 3/1/5, 1210 Vieno, Aŭstrio, kun ĉinaj geesp-istoj.

\* S-ro Matumoto Kiyosi, 48-j. instruisto, kun ĉinaj geesp-istoj pri historio, literaturo, lingvoj, kc. Adr.: Kikusuityo 5-tyome 1-13, Hyogo-ku, Kobe, Japanio (652).

# KELKAJ VIDAĴOJ SUR LA INSULO HAINAN

de TIANLAI

**H**AINAN kun areo de 32,200 kvadrataj kilometroj estas la dua granda insulo de Ĉinio situanta en la Suda Ĉina Maro, sude de 20 gradoj de la norda latitudo. Meze de la insulo staras kvin montopintoj nomataj Wuzhi. Preskaŭ la tuta insulo estas kovrata de verdajoj, kaj ĝia tropika primitiva pluva arbaro estas aparte admirinda.

## EN LA TROPIKA PLUVA ARBARO

Mi venis al la rezervejo de tropika arbaro Jianfengling sudokcidente de Wuzhi-montaro, kiu okupas 1,635 hektarojn.

Akompanate de arbaristoj, mi faris du-tagan viziton al la arbaro. Tie min allogis arboformaj pteridoj. Ĝia dika trunko altas kelkajn metrojn kaj sur ĝia trunko sidas dekoj da grandaj duoble pinataj folioj kun multaj pinataj folietoj. Oni diris al mi, ke antaŭ centoj da milionoj da jaroj la ĉefaj vivaĵoj sur la ter-

globo estis dinosaŭroj kaj pteridoj. Poste, la dinosaŭroj fosiliĝis kaj la pteridoj turniĝis en karbon. Nun la restantaj plantoj kreskas nur en humida tropika zono, kaj sur la insulo Hainan oni trovis 9 speciojn de tia vegetalo. Alia arbo ankaŭ estas tre interesa. Ĝi nomiĝas sukerpalmo (*Arenga pinnata*). La trunko altas dekelkajn metrojn kaj ĉiu folio longas kelkajn metrojn kaj larĝas 2 metrojn. Sur ĝia 2-metra grapolo sidas interpreme multaj fruktoj, kiuj pezas ĉ. 50 kilogramojn.

En la densa arbaro kreskas miloj kaj miloj da arboj altaj je dekoj da metroj. Aparte miriga estas tio, ke ĉi tie troviĝas 80 specioj de valoraj porlignaj arboj, inter kiuj troviĝas 4 superklasaj arbospecioj. Unu el ili estas buterarbo (*Madhuca hainanensis*). Ĝia aspekto ne estas atentinda, sed ĝia ligno estas tre malmola kaj ne putriĝas en akvo eĉ dum mil jaroj.

Alia pli valora arbo (*Hopea hainanensis*) estas la plej bona el la porlignaj arboj. Estas ankaŭ rozligna arbo (*Dalbergia odorifera*), kies ligno estas tre kompakta kaj surhavas nubajn vejnojn. Mebloj faritaj el tiu ligno estas tre belaj kaj longe-uzebaj kaj surportas neviŝeblan aromon. En la loko la plej alta arbo estas prunujo (*Vatica astrotricha Hance*) kun alteco de 30-40 metroj.

Plej miriga arbo estas *Scleropyrum wallichianum*. Ĝiaj nuksoj entenas oleon je 60%, kiu taŭgas kaj por industrio kaj por manĝado. Prunotaksuso (*Cephalotaxus hainanensis*) havas tre ordinaran aspekton. Sed ĝi entenas kancericidan substanceton. Oni diris, ke en la rezervejo troviĝas pli ol mil specioj de drogaj vegetaloj, ekzemple, la fama valora Hainan-a agloarbo, kies sekreciaĵo povas elimini doloron kaj mukajon.

Manglarbido



Apudmara rezervejo de Manglarbaro



En la tropika arbaro ĉiuj vegetaloj konkuras por akiri pli da sunlumo. Preskaŭ la tuta spaco estis okupita de lianoj kaj aliaj grimpoplantoj. Arbegoj sendube povas akiri sufiĉan sunlumon, kaj ankaŭ multaj pteridoj kaj orkideoj povas akiri tion pene grimpinte sur la arbegojn kaj tiel formiĝis bela pendĝardeno.

## VALORA DEKLIVA CERVO

Kun granda intereso mi veturis al la natura rezervejo Datian en la gubernio Dongfang en la okcidenta parto de la insulo, por viziti la faman deklivan cervon. Krom la junkorno, ankaŭ ĝiaj viando, sango kaj gelateno preparita el ĝiaj ostoj kaj haŭto estas bonaj tonikoj.

Rigardante de sur la malgranda blanka etaĝdomo de la administracio de la rezervejo, oni povas vidi senliman tropikan sekkan stepon kun malmultaj arboj, grandaj kaj malgrandaj arbedaroj, rojoj kaj lagetoj, . . . jen estas la hejmo de la dekliva cervo.

La estro de la administracio Wang Qian naskiĝis en Kamboĝo. Reveninte al la Patrio, li estis taskita por protekto de raraj bestoj en la gubernio. Akceptinte lian proponon oni starigis la rezervejon de la dekliva cervo en la loko.

Kamarado Wang kondukis min sub iun arbon. Li diris al mi: "Jen la gresejo frekventata de cervoj. Vi atendu ĉi tie." Post dekkelkaj minutoj alkuris 4 cervoj. La dekliva cervo estas alta kaj surhavas okulfrapajn blankajn makulojn same kiel makula cervo. La diferenco inter la du specoj de la bestoj estas tio, ke la makula cervo havas makulojn tra la tuta korpo,

dum la dekliva cervo nur sur la dorso.

En la pasintaj jaroj kamarado Wang detale observis la vivadon de dekliva cervo kaj estis rigardata kiel specialisto pri la besto. Li plurfoje provis proksimiĝi al cervoj en nokto por observado, sed la cervoj estas singardemaj. Ĉe la 11-a de nokto la cervoj devas manĝi herbojn kaj poste dormas dorso kontraŭ dorso. Por la tuta cervaro gardostaras unu cervo. Se ĝi rimarkos ion danĝeran, ĝi tuj eklekos kaj la vekitaj cervoj tuj fuĝos disen. Sed foje, eble la sentinelo estis tro laca kaj endormiĝis, kaj tiam kamarado Wang sukcesis alproksimiĝi al la cervogregoj.

Ne tre malproksime de la rezervejo estas Wuzhi-montaro. En la montaro kreskas densaj lianoj, kiuj ofte implikis la kornojn de la cervoj, kaj tial la cervoj neniam iris en la montaron kaj preferas vivi sur la seka stepo kun malmultaj arboj. Eble pro tio oni nomas la beston dekliva cervo.

## MANGLARBARO

En la haveno Dongzhai nord-oriente de la insulo estas rezervejo de manglarboj. Ni ascendis la supron de iu konstruaĵo alta je dekoj da metroj kaj vidis, ke ĉirkaŭe sur la marbordo kreskas malaltaj manglarboj kaj la arbaro kovras spacon de miloj da hektaroj. En la arbaro lirlas riveretoj zigzagaj. Ni venis en malfluso kaj povis vidi la tutan arbaron. Oni diris, ke en fluso la arbaro dronas en la maro kaj oni povas vidi nur la verdajn arbokronojn.

En sudorienta Azio manglarboj altas 6-7 metrojn, sed tiuj de Hainan altas nur 1-2

metrojn. Malaltaj estas la manglarboj de Hainan, sed ili kreskas dense kaj formas fidindan arbomuron kontraŭ vento. Cetero la arbaro liveras abundon da nutraĵoj por fiŝoj kaj salikokoj. Kie troviĝas densa manglarbaro, tie certe multas fiŝoj, salikokoj kaj kraboj. La ligno de manglarbo estas hele ruĝa. De ĝi oni povas akiri bonkvalitan tanilon kaj ruĝan farbon, kaj tieaj fiŝistoj tinkturas fiŝretojn per la suko de la arbo.

Ni veturis pli profunden en la manglarbaron laŭ rivereto per malgranda boato kaj vidis, ke ambaŭborde estas tre malaltaj aŭtunaj melongenoj (*Kandelia candel*) elkreskantaj el iliaj tuberaj radikoj. La diversformaj radikoj estas tre similaj al skulptaĵoj. Iuj similas al kapo de drako, aliaj al kapo de simio kaj pli multaj similas al maljunaj feoj. Tie kreskas ankaŭ korna frukto (*Ceriops tagal*) kun alteco de malpli ol unu metro, kiu entenas multan tanilon. Dekoktaĵo de ĝia ŝelo povas ĉesigi hemoragion kaj kuraĉi malignan furunkon.

Plej interesa estas la manglararbido. Ĝi ĝermas sur la arbo kaj defalas post maturiĝo. Kelkajn minutojn post kiam ĝi falis sur kotan grundon, tuj elkreskis sur ĝi ŝoso kaj radikoj. Se iuj manglararbidoj ne povas enradikiĝi kaj estas forportitaj de fluo, ili povas daŭre vivi 4 monatojn kaj kiam ili ŝance estas portitaj al tero, ili tuj enradikiĝas.

Same kiel aliaj rezervejoj, ankaŭ rezervejo de manglarboj estas bone protektata de ĉirkaŭaj loĝantoj. Estos punata tiu kiu malobservos la regulojn pri protekto de la rezervejo.





## Kelkaj vortoj pri la ĉina klasika poezio

Tiu ĉi artikolo estas prenita el la poemaro "El Ĉina Poezio" kompilita kaj esperantigita de S.J. Zee. Presante ĝin en la gazeto ni faris mallongigon.

La Red.

**R**IĈEGA estas la trezoro de ĉina klasika poezio kaj tre longa ĝia historio. Neniu povas diri precize, kiam ĝi komenciĝis. Ekzistas ja poemoj atribuitaj al la epoko de la antikvaj suverenoj Yao kaj Shun<sup>1</sup> (2357—2207 a.K.), sed ili unufoje aperis en multe pli malfruaj libroj kaj la aŭtentikeco estas dubinda. Se *La Kanto de la Kvin Reĝidoj*, kiu troviĝas en nia plej antikva skriba historio *Shujing*<sup>2</sup> (*La Libro de Antikva Historio*), estas aŭtentika, la ĉina poezio datiĝis jam de pli ol kvardek jarcentoj, ĉar tiu historia evento okazis laŭdire ĉe la komenco de la dudek-dua jarcento a.K., sed ĉio ĉi tio restas ankoraŭ en legenda nebulo kaj mankas al ni pruvo sufiĉe fidinda.

La unua ampleksa kolekto de antikvaj poemoj estas *Shijing*<sup>3</sup> (*La Libro de Poezio*), kiu kompiliĝis antaŭ la tempo de Konfucio kaj la nunan definitivan redakcion ni ŝuldas al li. Ekde tiam la libro estas vaste legata de ĉinaj kleruloj de ĉiuj generacioj kaj la poetoj de la pasinteco senescepte ĝin rigardis kiel la plej altan modelon de poezio kaj lernis de ĝi la arton de versverkado. La libro konsistas el 305 poemoj, kiuj dividiĝis en tri grupojn: 1. "Feng", liriko el dek kvin vasallandoj; 2. "Ya", politikaj kaj didaktikaj poemoj; kaj 3. "Song", danckantoj por diversaj ritoj. Ili formiĝis el kvarsilabaj versoj. Ĉiu poemo, escepte de parto el "Song"-grupo, dividiĝis en egal- aŭ neegal-longajn stancojn.

La modernajn legantojn plej interesas la lirika poemoj el la unua

grupo. La poetoj kantis pri sia ĝojo aŭ ĉagreno, amo al la bono kaj belo, indigno kontraŭ la abomenaĵoj kaj maljustaĵoj el la tuta koro, ni kvazaŭ aŭdas iliajn korbatojn. La tre simpla, preskaŭ naiva stilo kun tia senornama beleco nin mirigas, dum la pli longaj poemoj kun pli seriozaj temoj de la "Ya"-parto estas plenaj de profunda saĝo kaj en trankvila majesta maniero. Ĉiuj tiuj verkoj el la 11-a ĝis la 6-a jarcentoj a.K. ĉiam vekas grandan admiron de la legantoj nuntempaj kaj ilia freŝa brilo neniel paliĝis post ĉirkaŭ dudek kvin jarcentoj.

Escepte de tre malmultaj poemoj, kie la verkintoj malkovris sian personon, la tuta kolekto apartenis al anonimaj aŭtoroj. En tiu florado de ĉina poezio oni ne povas citi iun ajn konatan poeton. La unua granda ĉina poeto estas Qu Yuan<sup>4</sup> (340—278 a.K.), kortegano kaj parenco de la reĝa familio de Chu<sup>5</sup>-lando. Li vidis la korupton kaj senzorgon de la kortego antaŭ la minacanta invado de la potenca najbaro, Qin<sup>6</sup>-lando, kaj donis ripetfoje admonojn kaj konsilojn al la reĝo por tiun atentigi pri la kriza situacio de la regno. Sed la reĝo ne aŭskultis, male tre kolektis pro liaj ripetitaj admonoj kaj ekzilis lin al la sudo. Li tre malĝojis kaj malesperante droniĝis sin en Miluo<sup>7</sup>-rivero. Li verkis multe dum ekzilado por esprimi siajn malĝojon kaj maltrankvilon por la patrujo, nome: *Li-sao* (*Disiĝa Malĝojo*), *Naŭ Ĉapitroj*, *Naŭ Kantoj*, *Demandoj al la Ĉielo*, *Longa Vojaĝo*, *Revoko al la Vaganta Animo ktp.* Tiuj poemoj malfermis

tute novan epokon por la ĉina poezio. Lia varma patriotisma emocio bolas sub la kovro de riĉe ornamita alegorio kaj senbrida vaganta fantazio.

Lia ĉefverko *Li-sao*, 374-versa poemo, kiel liaj ceteraj verkoj, estas plena de mitaj kaj historiaj aludoj. Ankaŭ en la formo ĝi diferencas de la poemoj de *Shijing*. Ĝi formiĝis ĝenerale de sessilabaj versoj kun rimo ĉe ĉiu parnombra verso kaj sensignifa vorto "yi" ĉe la fino de neparnombra por plilongigi la sonon de la lasta vorto kaj fari paŭzeton inter la du versoj. Kompreneble la silabnombro de la verso ne estas ĉie egala. En la *Naŭ Kantoj* la versoj estas ĝenerale kvarsilabaj kun okazaj esceptoj, kaj oni metis la vorton "yi" en la mezon de ĉiu verso. Tiu ĉi versformo kun la vorto "yi" inter du versoj aŭ en la mezo de ĉiu verso estis vaste uzata dum la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.—24 p.K.). Ĉar ĝi devenis de Chu-lando, oni nomis ĝin stilo de *Chuci* (Chu-poemoj).

La imperiestro Han Wudi (140—88 a.K.) fondis ŝtatan muzikan instituton kaj dissendis senditojn por kolekti popolkantojn el diversaj regionoj por ilin adapti al muziko. La konservitaj tekstoj de tiaj kantoj ne ĉiuj estas el tiu tempo. Multaj versajne apartenas al pli malfrua dato. Iliaj versformoj estas tre diversaj, sed la kvinsilaba verso okupas la ĉefan lokon. Iom post iom ankaŭ la literaturistoj adoptis tiun formon kaj ĝi baldaŭ anstataŭis la elmodiĝintajn kvarsilabajn

de *Shijing* kaj la sessilabajn de *Chuci*. Dum la Orienta Han-dinastio (25—219) tiu ĉi formo jam atingis altan perfektecon kaj kelkaj el la tiamaj popolkantoj kaj la anonimaj *Dek Naŭ Poemoj* estas veraj gemoj de ĉina literaturo. De tiam la kvinsilaba verso fariĝis la ĉefa versformo de ĉina klasika poezio.

Antaŭ la tria jarcento ni trovas neniun, kiu dediĉis sin al la poezio. La restantaj poemoj ĝenerale estis okazaj produktaĵoj. La grava historia figuro Cao Cao (155—220) estis samtempe unuaranga poeto kaj verkis dekojn da poemoj, kiujn la posteuloj estimis tre alte. Liaj du filoj, Cao Pi (187—226), la unua reĝo de Wei-dinastio, kaj Cao Zhi (192—232)<sup>8</sup>, ambaŭ estis geniaj verkistoj, precipe la lasta, kiu verkis grandan kvanton da belegaj poemoj kaj prozaĵoj. Oni preskaŭ unuavoĉe nomis lin la princo de poezio. Ili grupigis ĉirkaŭ si aron da literaturaj talentuloj. La “plejadon de la epoko de Jian-an<sup>9</sup> (196—219)” tre bone konas ĉiuj lernantoj de la historio de la ĉina literaturo.

De la tria ĝis la sesa jarcento, la ĉina popolo travivis longdaŭran malordon, pro senĉesa intermilito kaj ofta ŝanĝiĝo de dinastioj. La plejparto de aristokrataj kleruloj vivis en malesperiga stato. Tre abundis en tiu epoko poetoj kaj poemkolektoj, sed krom malmultaj esceptoj, la stilo estas multe ornamita kaj la enhavo tute frivola. Tao Qian<sup>10</sup> unusola, kantante pri siaj simpla vivo kaj nobla penso kun tute natura kaj senornama stilo, montris sin tre altkvalita poeto. Post li, Bao Zhao<sup>11</sup> estis tre brila talentulo. Aperis ankaŭ deko da menciindaj poetoj, sed neniu povas kompari kun tiuj du. Dume abunde en tiu tempo belaj popolkantoj. Tiuj de la sudo ĝenerale temis pri amoro, dum la nordaj spegulis la vivon de la kuraĝaj nomadoj. Ni trovas inter ili multe da etaj gemoj de nia poezio.

La kvinsilaba verso estis la reganta versformo de tiu epoko, sed

la sepsilaba jam ekĝermis en Han-dinastio kaj iom post iom disvolviĝis. Kvankam ni trovas sennombrajn tre melodiasajn poemojn antaŭ tiu tempo, tamen ne ekzistis ankoraŭ fiksita regularo de metriko. Ĝin unuafoje proponis la fama poeto kaj historiisto Shen Yue<sup>12</sup> (441—513) kaj perfektigis en praktikado la Tang-dinastiaj kortegaj poetoj Shen Quanqi kaj Song Zhiwen<sup>13</sup> en la malfrua parto de la 7-a jarcento. De tiam la ĉefaj versformoj de ĉina klasika poezio estis la kvinsilabaj kaj sepsilabaj versoj en malnova maniero (sen fiksitaj metriaj reguloj) aŭ en nova maniero (kun fiksitaj reguloj).

Tang-dinastio (618—907) vidis la plenfloradon de nia poezio. Ĝi estis senprecedenca kaj kvante kaj kvalite. Tiom da brilaj steloj aperis sur la poezia ĉielo, sed super ĉiuj brilis blindige du plej grandaj astroj, Li Bai (701—762) kaj Du Fu (712—770). Oni nomis Li feo de poezio kaj Du sanktulo de poezio. La mirindaj poemoj de Li impresas nin kvanzaŭ supernatura kreitaĵo. Lia flugila penso levis sin ĝis la ĉielo kvazaŭ neniam tuŝante la teron. Ĉio fluis el sub lia plumo tiel neatendite sed spontanee. Dume Du Fu ĉiam staris sur la firma tero. Li vivis inter la popolamaso, sentis kaj suferis kune kun ili. Lia verkaro spegulis la tutan epokon kaj la tutan societeton, tial oni nomis lin poeto-historiisto. Li nutris sin per la tuta heredita poezia kulturo, sed ĉion li kunfandis kaj transformis sub sia plumo. Per la diverseco de stilo kaj la amplekso de enhavo, li superis ĉiujn antaŭajn kaj postajn poetojn. Li estas unika en la historio de la ĉina poezio. Tiuj du poetoj estas tiel grandaj, ke malfacilas diri, kiu estas la pli granda. Ni nur povas diri: Li Bai estas la poeto de poetoj kaj Du Fu la poeto de la popolo. Li Bai ni admiras, dum Du Fu ni amas. Jen la kulmino de la ĉina klasika poezio kaj la postaj jam ne atingis tiun altan nivelon.

La poetoj de Song-dinastio (960—1270) grandparte verkis sub la influo de Du Fu kaj aperis kelkaj grandaj talentuloj, inter kiuj la plej rimarkindaj estis Su Shi<sup>14</sup> aŭ Su Dongpo (1037—1101) kaj Lu You aŭ Lu Fangweng (1125—1210).

La poezio kun la supre menciitaj versformoj jam evoluis ĝis la lasta limo. Kvankam ĝi daŭris ankoraŭ tre longe, eĉ hodiaŭ oni ofte verkas en tiuj formoj kaj dum la lastaj sep jarcentoj aperis multe da eminentaj poetoj, tamen troviĝis jam nenio nova.

Du apartaj branĉoj de poezio sekvis. Dum la malfrua duono de Tang-dinastio ekestiĝis nova formo de poezio, nomata “Ci”, kiu plenfloris dum Song-dinastio kaj fariĝis la reganta poezia formo de tiu epoko. Ankaŭ troviĝas multaj majstroj de ĉi tiu speco de poemoj. Ĝi unue estis adaptita al muziko kaj kantita de kantistinoj aŭ dancistinoj. Ekzistis por ĝi centoj da apartaj arioj. Por ĉiu aparta ario estis fiksita versformo, t.e. kun fiksita nombro da versoj neegallongaj kaj fiksita nombro da silaboj por ĉiu verso. Ĉiu aparta ario havas sian specialan ritm- kaj rim-aranĝon. Eĉ tre eta malprecizeco malebligis la kantadon. Sed iom post iom iuj arioj elmodiĝis kaj iliaj melodioj baldaŭ estis forgesitaj. Fine tiu branĉo de poezio tute liberiĝis de la muziko kaj restis al ĝi nur la aparta versformo kaj ĝi funkciis same kiel la kvinsilabaj kaj sepsilabaj versoj.

La alia branĉo estas “Qu”<sup>15</sup>, kiu aperis post “Ci” kaj floradis en Yuan- (1277—1367), Ming- (1368—1643) kaj la unua duono de Qing<sup>16</sup>- (1644—1911) dinastioj. Ankaŭ ĝi estis adaptita al muziko kaj uzata ĉefe por versdramoj. La Yuan-dramoj ĝenerale konsistis el kvar aktoj kun prologo aŭ intermezoj inter la aktoj. Restas al ni multe da ĉefverkoj el tiaj dramoj. La plej konata kaj plej longa estas *La Okcidenta Ĉambro*, kiu dividiĝis en

dudek aktojn, reale kvin dramoj kunligitaj. La versdramoj de Ming-kaj Qing-dinastioj estas multe pli longaj, kelkaj eĉ superis kvindek aktojn. La plej famaj: *Peonia Pavilono* de Tang Xianzu<sup>17</sup>, *Longviva Palaco-salonego* de Hong Sheng<sup>18</sup> kaj *Persikflora Ventumilo* de Kong Shangren<sup>19</sup> estas vere grandaj ĉefverkoj en belegaj versoj.

Ni ne posedas epopeojn kiel *Iliadon* aŭ *Eneidon*. Niaj vers-rakontoj limiĝis je kelkdeko da versoj. La plej longa kaj bona el ili, *La Pavo Flugas Sudorienten*, (ĉe la komenco de la tria jarcento), nombras nur 357 versojn. Tamen dum la 16-a — 18-a jarcentoj aperis multe da vers-romanoj, kiujn profesiaj rakontistoj kantis al la publiko je la akompano de kord-muzikilo. Ili temis ĝenerale pri amaventuro inter talentaj gejunuloj kaj estis vaste ŝatataj, speciale de virinoj. Sed ilia stilo estis malkompakta kaj iom vulgara laŭ la gusto de la amaso, nur malmulte el ili atingis la nivelon de serioza literaturo.

Jen la tre rapida skizo pri la ĉina klasika poezio.

Mi ankoraŭ volas paroli iomete pri ĝiaj ordinaraĵoj. Diference de la okcidenta poezio, la universalaj temoj: Dio, amo kaj milito ne okupis tiom gravan lokon en ĉina klasika poezio. Ĉinoj ne estas religiema popolo. Ilin multe pli interesis la homa mondo ol la supernatura Dia volo. La saĝulo Konfucio diris: "La ĉiela vojo estas malproksima, la homa vojo estas proksima." La antikvaj ĉinoj kultis la ĉielon kaj la aliajn naturajn fortojn. Sed en ilia imago, la ĉiela suvereno neniel similis al la greka Zeŭso aŭ la kristana Jehovo. Li estis tre abstrakta, reprezentante nur ian superan moralan forton. Poste budhismo venis el Hindujo kaj sukcesis varbi multe da adeptoj, sed por la plejparto de la kleruloj ĝi restis nur filozofia doktrino, kiu influis la vivosintenadon de parto de la poetoj. En iliaj verkoj nenia fervoro religia speguliĝis, kiel kristanismo por la okcidentaj poetoj.

Ĉinaj klasikaj poetoj kantis ankaŭ amon, sed ĝia signifo estis pli-vasta. Ili pli ofte kantis pri la amo al la gepatroj, la amo inter la geedzoj, gefratoj, amikoj, frathomoj ktp. Amoraĵn poemojn ni havas, speciale inter la popolkantoj, sed ili ne okupis tian gravan lokon kiel en la okcidenta poezio.

Pri milito, la sintenado de ĉinaj klasikaj poetoj estis kritika, ili senescepte severe riproĉis ĉiajn ekspansismajn militojn, kiuj nepre portas katastrofojn al la popolo. Ili gloris nur la heroojn de la kontraŭinvadaj militoj. Tial la bildo de militoj en nia poezio estis ĝenerale tre malhela kaj terura.

Niaj poetoj amas la naturon, la homojn, noblajn agojn kaj pensojn. La ĉefa karaktero de la ĉina klasika poezio estas ĝia humaneco.

La metriko de ĉina klasika poezio havas ankaŭ siajn apartaĵojn. Mi jam diris supre: por la poemoj en malnova maniero ne ekzistas fiksitaj reguloj pri la ritmoaranĝo. La melodio dependas de la lerta manipulado de la poeto, kio estas afero intuicia. Reguloj ekzistas nur por la poemoj en nova maniero. Teorie, same kiel la metriko de la okcidenta poezio, ĝi baziĝas principe sur la alternadoj de fortaj kaj malfortaj sonoj. Sed diferencas en tio: la metriko unu de ĉina poezio ne estas silabo, sed piedo, do fortaj kaj malfortaj piedoj alternas. Du silaboj faras piedon, la forta piedo konsistas el du fortaj silaboj kaj la malforta piedo: du malfortaj. Ĉar la versoj de la ĉinaj klasikaj poemoj estas aŭ kvinsilabaj aŭ sepsilabaj, unu el la tri aŭ kvar piedoj devas esti unusilaba, dum legado oni faras paŭzeton post tiu silabo aŭ iom longigas ĝin. Laŭforme troviĝas nur du specoj de poemoj en la nova maniero, tio estas, versokvaro kaj versoko.

Ankaŭ la rimado havas sian apartecon. Ĉinaj vortoj estas monosilabaj kaj ĉiuj finiĝas per vokalo aŭ diftongo, aŭ per vokalo (aŭ diftongo) kun aldonita "n" aŭ "ng".

Do ĉiuj vortoj finiĝantaj per la sama vokalo aŭ diftongo ktp. apartenas al la sama rimo. Tion rigardus la okcidentuloj ne rimoj. Tial rimado estas tre facila afero por ĉinaj poetoj. Por poemoj en malnova maniero oni povas uzi la saman rimon ĝis la fino, kiom ajn longaj ili estus.

La rimaranĝo estas tre simpla. Ĝenerale ni metas rimon al ĉiuj parnombraj versoj, alternaj kaj ringaj rimoj ne ekzistas. Nur en longaj poemoj de sepsilabaj versoj en la malnova maniero oni kelkfoje uzas la kontinuajn rimojn, kiuj iam sekvas sin de la unua verso ĝis la fino en la sama rimo. Cetere oni ĉiam metas paŭzeton post ĉiu verso kaj transpaŝo estas malpermesita.

Tiuj apartaĵoj de la metriko aŭ rima sistemo estas neimiteblaj en Esperanta traduko.

La ĉina klasika lingvo estas multe pli konciza ol Esperanto kaj dum la tradukado, oni ĉiam trovas sin postiganta en la vetkurado eĉ duobligante la longecon de ĉiu verso.

La supra skizo, tre elementa kaj ne komplete, estas verkita por alilandaj Esperantistoj, kiuj deziras ion scii pri tiu subjekto sed ne havas la eblon legi en la originala lingvo.

S.J. ZEE, Shanghai, januaro, 1980

1. Elparolu Yao kiel *jaŭ* kaj Shun kiel *ŝun*.
2. Shujing (elparolu *ŝuĝing*)
3. Shijing (*ŝiĝing*)
4. Qu Yuan (*ĉju jŭan*)
5. Chu (*ĉu*)
6. Qin (*ĉin*)
7. Miluo (*milŭo*)
8. Cao Zhi (*caŭ ĝi*)
9. Jian-an (*ĝjan-an*)
10. Tao Qian (*taŭ ĉjan*)
11. Bao Zhao (*baŭ ĝaŭ*)
12. Shen Yue (*ŝen jŭe*)
13. Shen Quanqi (*ŝen ĉŭanĉi*), Song Zhiwen (*song ĝi-ŭen*).
14. Su Shi (*su ŝi*)
15. Lu You (*lu joŭ*)
16. Qu (*ĉju*)
17. Qing (*ĉing*)
18. Tang Xianzu (*tang ŝjanzu*)
19. Hong Sheng (*hong ŝeng*)
20. Kong Shangren (*kong ŝangjen*)



# Muzeo de Bambuoj



de KANG QINGLIANG



*Bambuo Arahato*

**V**ENIS printempo. Ĉie en la urbo Chengdu (Ĉengdu) regas verdeco. Wangjiang-parko ĉe la bordo de Jinjiang-rivero en ĝia orienta antaŭurbo elspiras fortan vivecon. La aroj da verdaj bambuoj formis originalan stilon de la parko. Ĉar en ĝi kreskas bambuoj de multaj specoj, oni nomas ĝin muzeo de bambuoj.

Tuj post pluvo mi venis al la parko. La lavitaj bambuoj kun pluveroj sur la folioj prospere

kreskas ambaŭflanke de zigzagaj vojetoj kaj el inter bambuaro elrigardas pavilonoj kun orumitaj ornamadoj sur la tegmentoj kaj ruĝaj kolonoj. Mi promenis inter bambuaroj aŭskultante rimarkigojn de mia gvidisto Meng pri la specoj de bambuoj.

En mia memoro bambuo ĉiam portas verdan koloron. Sed en tiu ĉi parko mi vidis bambuon nomatan Malgranda Kordobambuo kies kano portas brile flavan koloron kaj surhavas tri

maldikajn verdajn liniojn, kiuj aspektas kvazaŭ tri kordoj streĉitaj.


Apud la dirita speco troviĝas alia speco de bambuo nomata Granda Kordobambuo, ankaŭ ties kano surhavas tri hele verdajn liniojn. La lasta speco estas iom pli dika ol la unua kaj portas verdetan koloron. Eble ili apartenas al la sama familio.



Ĉirkaŭirinte kordobambuaron ni venis antaŭ aron da altaj kaj rektaj bambuoj kovritaj tutkorpe de maldika tavolo da blanka pulvoro. Se oni ĝin tuŝas per la mano, la pulvoro algluiĝas al la tuŝanto. Petolemaj knaboj ŝatas ŝerce ŝminki unu alian per tiu pulvoro.

Antaŭenirante laŭ zigzaga vojeto mi estis altirata de kurioza homvizaĝa bambuo, sur kies kano bonorde viciĝas nodoj, inter kiuj formiĝas ovaloj similaj al homa vizaĝo. Tiu rara speco de bambuo troviĝas ambaŭborde de Changjiang (Jangzi)-rivero.

Ĝenerale bambuoj havas rondan kaj kavan kanon. Sed en la parko Wangjiang troviĝas

*La parko Wangjiang*





J E B A M B U O J  
A N J L, L O K O A B U N D A














bambuo kun kvadrata kano enkondukita el la monto Jinfo de Sichuan kaj bambuo kun kavo maldika kiel vejno, enkondukita el Yunnan (Junnan)-provinco.

Tie troviĝas multaj valoraj specoj de bambuoj ne nur de Sichuan kaj aliaj provincoj de Ĉinio, sed ankaŭ de aliaj landoj. Estas speco de bambuo, kies ŝelo ne defalas de la burĝoniĝo ĝis la maturiĝo. Se oni volas vidi ĝian verdan kanon, oni devas forigi ĝian ŝelon. Ĝi nomiĝas kaŭĉuka bambuo kaj estas enkondukita de Tajlando. Ankaŭ la japana bambuo (*Arundinaria Hindsii*) tie enradikiĝis. Dank' al abundeco de pluvo, humida klimato kaj zorgema flegado ĝi kreskas prospere.

En la parko Wangjiang estas ankaŭ bambuo nomata Xiangfei. Pri la makuloj sur la bambuo cirkulas legendo: En la antikveco estis ĉina talenta kaj bonkora reĝo Shun. Li mortis bedaŭrinde ĉe Jiuyi-monto, kiam li inspektis la sudon de sia regno. Lia edzino Xiangfei tre ĉagreniĝis kaj dolore ploris ĉe bambuaro. Ŝiaj larmoj falis sur bambukanojn kaj fariĝis makuloj. Poste oni nomas tiun specon de bambuoj Xiangfei.

Elirinte el la bambuaroj ni venis al neluksa kaj eleganta korto, kie montriĝas diversaj envazaj pejzaĝoj, faritaj ĉefe el bambuoj kaj ŝtonoj. La envazaj pejzaĝoj estis aĉetebraj por la vizitantoj. Tie oni eksponis ankaŭ delikatajn bambuajn plek-

tajojn de Sichuan-provinco, kaj la tetrinkejo de la parko estis meblita per bambuaj seĝoj kaj tabloj. Bambuo ne nur plaĉas al la okuloj pro sia beleco sed ankaŭ estas taŭga materialo por fari diversajn vivbezonojn.


La nomata parko formiĝis dum longaj jaroj. Laŭdire, tie estis loĝejo de poetino Xue Tao de Tang-dinastio antaŭ 1,200 jaroj. Ŝi, eksterordinare talenta, povis verki poemon jam ekde la aĝo de 9 jaroj. Ŝi speciale faris helruĝajn paperfoliojn, sur kiuj ŝi verkis poemojn por donaci ilin al eminentuloj kaj eruditoj. Poste oni nomis tian paperon per ŝia nomo. En sia infaneco, la poetino jam spertis malfeliĉon pro morto de la patro. Ŝi vivis malriĉe dum la tuta vivo. Ŝi tre ŝatis bambuojn kaj verkis poemon por laŭdi ĝian "modestecon" kaj "honestecon". Post ŝia morto, oni entombigis ŝin apud ŝia loĝejo kaj konstruis kelkajn pavilonojn por memori ŝin.

Antaŭ la Liberiĝo la parko havis areon nur de 0.7 hektaro kaj ĝiaj bambuoj estis nur de ĉ. dek specoj. Post la Liberiĝo la areo de la parko pligrandiĝis ĝis 12 hektaroj kaj la specoj de la bambuoj atingis 150.

En la parko majeste staras Chongli-turo alta je 30 metroj. Ascendinte ĝin oni povas vidi, ke ĉiuj domoj estas ĉirkaŭataj de bambuoj. En tiu senlima bambuaro la parko Wangjiang ornamas la orientan parton de la urbo kvazaŭ miniatura envaza pejzaĝo.





*Bambuo "Ventre de Budho"*



*Bambuo simila al homa vizaĝo*

*Makula Bambuo Xiangfei*







*Tetrinkejo plena de klientoj*

LAO BAI:

## La dramo

### “Tetrinkejo”

**L**AŬ invito de la Manheim-a Ŝtata Teatro, la Beijing-a Popola Arta Teatro flugos, en septembro ĉijare, al FR Germanio por ludi la dramon “Tetrinkejo” okaze de la 200-jara jubileo de la fondiĝo de tiu teatro kaj la Internacia Drama Festivalo. Poste ĝi estos prezentata ankaŭ en Francio kaj aliaj landoj.

La dramo “Tetrinkejo” estas verkita de la forpasinta popola artisto Lao She en la 50-aj jaroj. Tiu triakta dramo prezentis la ŝanĝiĝojn de la ĉina socio en tri periodoj de la Reforma Movado en 1898 ĝis la liberiĝo de Beijing en 1948. Per scenoj en tetrinkejo ĝi priskribas la sorton de kelkaj personoj por montri la suferojn de la popolo en la malnova Ĉinio.

En la dramo estas pli ol 70 roluloj, ĉiu kun apartaj karakterizaĵoj. Inter ili estas eŭnukoj en la imperiestra palaco de Qing-dinastio, manĉuroj (apartenantaj al la sama nacieco kiel la imperiestro) favorataj per ŝtata greno, klerikoj vivantaj el pano de eksterlandanoj, kapitalistoj pledantaj por savi la patrolandon per industrio kaj komerco, bankrotintaj kampuloj, oficiroj, soldatoj kaj policianoj kaj feĉo de la malnova socio.

Antaŭ la komenco de ĉiu akto aktoro ludanta la rolon de kantisto prezentas la enhavon de la akto al la spektantoj, per mallonga poemo takte kunfrapante bov-ostojn.

La unua akto prezentas la okazaĵojn en 1898. Tiam imperiistoj invadis Ĉinion. La regis-

taro de Qing-dinastio estis ŝanceliĝanta, kaj la imperiestra patrino en potenco estis obstina kaj rifuzis ĉiujn reformajn proponojn prezentitajn de intelektuloj kun demokratia tendenco. La lastaj estis persekutitaj de la registaro.

Leviĝas la kurteno kaj malnova Beijing-a tetrinkejo prezentiĝas antaŭ la spektantoj. En ĝi sidas gastoj kun longa harligo en robo. Inter ili estas sinjoroj kun birdokaĝo, sortodivenistoj, negocisto pri homoj, letterskribisto kaj nenifarantoj kun flar-tabaka botelo. En la tuta dramo troviĝas tri ĉefroluloj: La unua estas la juna mastro de la tetrinkejo Wang Lifa. Li estas sprita kaj lerta. Li heredis la tetrinkejon de sia patro kaj ankaŭ lian filozofion pri vivo: Por pasigi

glate la tagojn, necesas diri plaĉajn vortojn al ĉiu ajn. Li akceptis la klientojn ĉiam kun rideto, kaj ofte montras al ili la slipon sur la muro kun avertaj vortoj "Ne preparolu ŝtatajn aferojn!" por ke ili ne sin endanĝerigu. La dua estas Sinjoro Chang Si, honesta patriota monĉuro. Li estis enkarcerigita de spionoj pro tio, ke li diris kun bedaŭro en la tetrinkejo, ke Qing-dinastio baldaŭ pereos. La tria estas Sinjoro Qin Er, juna kaj vastmensa kapitalisto kun granda volo savi la patrolandon.

La dua akto prezentas okazaĵon en 1918. Qing-dinastio estis jam renversita, tamen la diverslokaj militaristoj, reprezentantoj de la feŭdaj fortoj, kaptis la regpotencon kaj militas unu kontraŭ alia. En tiu tempo Sinjoro Chang Si vivas de legomvendado; la fabriko de Sinjoro Qin Er bankrotis; kaj la lerta mastro Wang fariĝis mezaĝulo. Por sin vivteni, li reformis la tetrinkejon laŭ la situacio. Neatendite, sekvis ĉantaĝoj de soldatoj, friponoj kaj spionoj. La vivo de la popolo fariĝis ankoraŭ pli malfacila, kaj la junaj studentoj preparas batalon por demokratio.

La tria akto prezentas la okazaĵon en 1947. Post la kaptulaco de Japanio, Kuomintango denove regas Beĵing (Pekinon). La tetrinkejo prenis alian aspekton: Sur ĝiaj muroj estas afiŝoj pri eksterlandaj cigaredoj kaj portretoj de filmosteloj de Holivudo. La vortoj sur la averta slipo estas pli grandaj. Mastro Wang fariĝis maljuna. Por prosperigi la tetrinkejon, li intencas dungi servistinon por la malprospera tetrinkejo. Sed ekster lia atendo tiu malgranda tetrinkejo estas kaŝe okupita de friponoj

*Dramisto Lao She (la dua de dekstre en la fronto) preparas la teatraĵon al geaktoroj.*



en kunagado kun ĝendarmoj kaj spionoj.

En la lasta horo de la vivo de mastro Wang, liaj malnovaj amikoj Sinjoro Chang Si kaj Sinjoro Qin Er ŝancelpaŝe venas. Plenaj de emocio, ili interparolas pri la pasintaĵoj kaj mokas la socion. Laŭ la malnova moro, la tri maljunuloj oferas al si la inferan papermonon, kiun oni disjetis dum funebra procesio ofere al la mortinto. Sidante ĉirkaŭ la tetablo, ili kaj kantas elegion kaj disjetas la papermonon. Post kiam la du maljunuloj foriris kun plorsingulto, mastro Wang sin pendigas.


Falas la kurteno. De fore aŭdiĝas obtuza kantado. Kaj la

kanto montras, ke okazis neevitebla revolucio kaj baldaŭ naskiĝos nova Ĉinio.

Antaŭ la Kultura Revolucio la Beĵing-a Popola Arta Teatro prezentis la dramon "Tetrinkejo" kaj rikoltis multajn laŭdojn de la spektantoj. Dum la pasintaj pli ol unu jaro ĝi prezentis pli ol 100 fojojn, kaj ĉiufoje neniu sidloko en la teatro estis libera.

La teatro fondiĝis en 1952. Ĝi estas unu el la plej famaj teatroj de Ĉinio kaj havas nombron da veteranaj artistoj, kiuj dediĉis sin dum jardekoj al la teatra arto. Ili posedas eminentan arton kaj riĉan praktikan

*La mastro de la tetrinkejo (la meza) kaj liaj du malnovaj amikoj*



sperton. Ili estas ŝatataj de spektantoj pro sia originala arto.

Yu Shizhi, kiu ludas la rolon de mastro Wang, estas fama teatra artisto. Lia 30-jara praktikado sur la sceno levis lian prezentarton ĝis perfekteco. Liaj movoj kaj gestoj, ĝoja kaj malĝoja mienoj, ĉiuj montris la altecon kaj riĉecon atingitajn de lia arto. Li diris, ke impliceco estas la naturo de la arto kaj propra al la vivo.

Zheng Rong, kiu ludas la rolon de Sinjoro Chang Si, estas fama pro sia ludo de roloj de maljunuloj de malsamaj socitavoloj, malsamaj tipoj kaj kun malsamaj karakteroj. La figuroj kreitaj de li estis versimilaj. Dum multjara praktikado sur la sceno li kunfandis la arton kaj la vivon.

Lan Tianye, kiu ludas la rolon de Sinjoro Qin Er, estas unu el la teatraj artistoj ŝatataj de la spektantoj. Li havas sorĉan voĉon inter baso kaj baritono.

La reĝisoro de tiu dramo Xia Chun kun 61 jaroj estas artisto ŝatata de spektantoj pro sia diligenta memlernado. En la arta praktikado li persistas en la realisma vojo kaj la nacia koloro de la drama arto. Lia arto karakteriziĝas per vereco, koncizeco, delikateco, integreco kaj forta nacia gusto kaj tio formas ĉefan parton de la arta stilo de tiu teatro. Li diris al mi, ke la teatro prezentos tiun dramon al eŭropaj amikoj, por ke pli multaj el ili konu la pasintan kaj nuntempan Ĉinion kaj kresku la amikeco inter la ĉinoj kaj eŭropanoj. Krome, dank' al la arta interŝanĝo, la ĉinaj artistoj povos lerni de la eŭropaj artistoj.



Lao She

**L**AO She (Laŭŝe) estis realisma verkisto, kiu longe ĝuis grandan renomon inter polanoj. Liaj verkoj plejparte priskribis la vivon de laboruloj kaj havas lokajn kolorojn kaj densan vivetoson. En decembro de 1951, la Beijing-a popola registaro honoris lin per titolo "Popola Artisto".

La 3-an de februaro, 1899, Lao She naskiĝis en familio de malriĉa soldato en Beijing. En lia infanaĝo lia patro mortis. Lia patrino vivtenis la familion per lavado kaj flikado de vestoj. Pro malriĉeco de la familio, Lao She intermite vizitis lernejon en kelkaj jaroj. Kvankam li ne povis viziti universitaton, tamen li ellernis en la reala vivo multajn sciojn, kiujn oni ne povis ellerni en lernejo. Li trapasis la malfacilan vivon kune kun siaj familianoj kaj dividis mizeron kun siaj parencoj kaj amikoj. La mizera vivo de laboruloj de la malnova Beijing kaj maljusteco de la socio estis profunde gravuritaj en lia koro jam de la infanaĝo, kaj tio metis ideologian bazon por lia verkado.

Kiam li lernis en la Beijing-a Normala Lernejo, li jam havis

ZONG BIAN:

## POPOLA ARTISTO

—Lao She

fortan inklinon al klasika poezio kaj komencis verki en la klasika han-lingvo.

En 1919, okazis en Beijing la granda novkultura movado de la 4-a de majo. Influate de la movado, Lao She komencis sian verkadon en la moderna han-lingvo.

En 1924 li veturis al Anglio kaj instruis la ĉinan lingvon en la Orienta Kolegio de la Londona Universitato. En tiu periodo li verkis tri satirajn romanojn, kia "Filozofio de Maljuna Zhang". El tiuj verkoj oni povas vidi liajn fortan justamon kaj varman esperon al la patrolando, kaj ankaŭ lian genion de sarkasmo kaj humuro en verkado. En 1937, aperis lia fama reprezentanta romano "Rikiŝisto Xiangzi". La romano prenis kiel fonon la vivon de la laboranta popolo de la malnova Ĉinio en la tridekaj jaroj kaj priskribis la tragedian sorton de rikiŝisto Xiangzi kaj profunde malkaŝis kaj vipis la kriman malnovan socion.

En tiu jaro la kontraŭjapana flamo brulis tra la ĉina teritorio. Patriota pasio kiel flamo brulis en la brusto de la verkisto. Li



senhezite forlasis sian familion kaj venis al Chongqing (Ĉongking), la kontraŭjapana postfronto, kaj gvidis la Kontraŭjapanan Asocion de la Tutlandaj Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj. Tiutempe li verkis "Postresta Nebulo" kaj aliajn dramojn kaj poemaron, li okupiĝis ankaŭ pri verkado de popularaj literaturaĵoj, verkis multe da guci-oj (unu el la ĉjuĵi-oj, kantrakontado kun tambureto) kaj dramoj kun kontraŭjapana enhavo.

En 1946 Lao She veturis al Usono por doni lekciojn. Krom lekiado, li verkis romanon "Kvar-generacia Familio" kun miliono da ideogramoj, kiu konsistas el tri partoj "Konster-niĝo", "Senrajta Vivo" kaj "Malsato", kun Beijing okupita de japanaj agresantoj kiel fono, kaj priskribas suferon de Beijing-aj popolanoj kaj ilian maledeman spiriton.

Precize en la jaro, kiam li estis 50-jara, li ricevis la ĝojigan informon pri la fondiĝo de la nova Ĉinio. Pro tio li ĝoje drinkis plurajn tagojn kaj samtempe planis sian revenon al la patrolando. Iun tagon, li subite ricevis leteron skribitan de ĉefministro Zhou Enlai entuziasme invitantan lin reveni al la hejmlando. La verkisto kortuŝiĝis ĝis larmoj. Je la 13-a de oktobro de 1949, li ŝipveturis al Ĉinio. Li revenis al Beijing forlasita antaŭ pluraj jaroj.

Post reveno al la patrolando, li aktive partoprenis en la konstruado de la nova Ĉinio. Li estis elektita kiel reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, vicprezidanto de la Ĉina Fede-

racio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj. Antaŭ liaj okuloj aperis tute nova mondo. Li reakiris senprecedencan forton de juneco en verkado. Li diris: "Mi devas prikanti la novajn aferojn en la nova socio!"


Parolante pri sia entuziasmo de verkado, li uzis la vorton ekstazo. Li ĉiutage laboris, eĉ dimanĉe kaj festtage. La diligenta laboro donis grandajn fruktojn. En la 17 jaroj post reveno al la patrolando, li verkis pli ol dek modernajn dramojn, kiaj "Longxugou", "Fang Zhenzhu", "Tetrinkejo", multajn teatraĵojn, infanajn dramojn, ĉjuĵi-ojn, prozojn, poemojn k. a. sume kun milionoj da ideogramoj. Ĝuste pro tio Lao She estis honorita kiel labormodelo de la literatura kaj arta rondo.

Popola artisto Lao She havis intiman rilaton kun popolamasoj. Krom verkado, Lao She ofte vivis en popolamasoj. En 1959, por krei la dramon "La Feliĉa Familio", li havis korverŝan interparoladon kun fremdaj patrino kaj filino, kiuj disiĝis dum dekoj da jaroj kaj multe suferis en la malnova socio, kaj rekunvivis en la nova socio. Lao She larmis pro ilia mizera

vivo kaj ĝojis pro ilia feliĉa kunvivo. En la antaŭparolo de "Elektitaj Verkoj de Lao She", li diris: "Mia profesio postulis min vivi ĉiam inter intelektuloj, tamen krom profesoroj kaj instruistuloj, mi amikiĝis ankaŭ kun strataj boksistoj, kantistoj, rikiŝistoj... Ili helpis min, ankaŭ mi ilin. Ili gratulis min je mia naskiĝtago kaj kiam ili geedziĝis aŭ naskis bebon, ankaŭ mi iris gratuli ilin. Tiel mi sciis bone ne nur ilian vivon, sed ankaŭ iliajn deziron kaj inklignon." Li ofte montris sian dramon kompletigitan al reĝisoro kaj geaktoroj por peti opiniojn de la lastaj.

En la 60-aj jaroj Lao She estis 60-jara maljunulo, li estis ankoraŭ fervora en verkado. Kiam li kun malsano komencis verki grandan modernan dramon "Sub Ruĝa Flago", la kultura revolucio komenciĝis. Liaj verkado kaj vivo suferis de serioza atako kaj post nelonge li forpasis bedaŭrinde.

Nun liaj romanoj "Rikiŝisto Xiangzi" kaj "Kvar-generacia Familio" estis represitaj. La dramo "Tetrinkejo" sursceniĝis refoje. Tiuj liaj verkoj, kiel antaŭe, forte kaptas la vastajn legantaron kaj spektantaron.



# MISTERA INFORM- KAPABLO DE LA HOMA KORPO

**E**STAS mirinde, ke homo povas vidi objektojn kaj distingi kolorojn ne per la okuloj. Tian mirindajon konstatis la Simpozio pri Eksterordinara Funkcio de la Homa Korpo okazinta antaŭ nelonge en Shanghai (Ŝanhajo) de Ĉinio.

Al la simpozio estis invititaj 14 9-25-jaruloj por ekzameno. Ili kapablas, en malsamaj gradoj, percepti formojn kaj distingi kolorojn per siaj verto, oreloj, akseloj, dorso, pojnjoj, fingroj, genukavoj, piedfingroj aŭ plandoj. Ĉe iuj la akseloj estas plej akresentaj, ĉe aliaj akre sentas la fingroj, kaj ĉe triaj pluraj korpopartoj posedas tian kapablon samtempe.

En la simpozio la 14 ekzamenoj 10-foje montris sian kapablon antaŭ la ĉeestantoj. Kaj pli ol 2,000 sciencistoj, medicinistoj, edukistoj, ĵurnalistoj kaj eldonistoj propraokule vidis ilian mirindan kapablon. La 14 ekzamenoj estis provitaj po pli ol 100 fojojn en grandaj kaj malgrandaj kunvenoj, kaj ĉ. 80% de la provoj pruvis ilian apartan perceptan kapablon.

La senso de tiuj korpopartoj estas tre mistera. Ĝi povas tra-

penetri diversajn barojn netrapenetreblajn por la okuloj. Per tio ĝi ebligas al la ekzamenoj percepti objektojn en glu-fermita dikpatera saketo, sigelita plasta skatolo aŭ fand-fermita ampolo. Eĉ se oni metas objekton en 10-20-kilogramojn-pezan aluminian poton kun muro 40 milimetrojn dika uzatan por enteni izotopojn, la ekzameno povas percepti ĝin palpante la eksteran muron de la poto. Malgraŭ ke oni plurfoje faldis aŭ ĉifis paperfolion kun skribaĵo, ĝia kompleta bildo tamen povis aperi en la cerbo de la ekzameno.

Kiel montriĝas la bildo al la ekzamenoj? Ili diris, ke ili sentas ĝin en la antaŭa parto de la kranio kaj tio okazas kvazaŭ ili televidus. Tamen neniu el ili donis precizan respondon. Vicprofesoro Wang Chu, vicdekano de la radia fakultato de Beijing-a Universitato, faris al la simpozio raporton pri interesaj detaloj. Li kune kun estro de la naturscienca fakultato de la sama universitato Chen Shouliang kaj aliaj kamaradoj formis esploran grupon, kaj tiu grupo notis, ĉe la loko, la vortojn de la ekzamenoj pri la momentaj ŝanĝiĝoj dum montrado de la bildo en ilia cerbo kaj trovis, ke la perceptado de iliaj korpopartoj diferencas de tiu de iliaj okuloj per tio, ke la bildo ne formiĝas unufoje, sed iom post iom, parto post parto, kaj pli kaj pli klare. Ekzemple, kiam la ideogramo 唱 estis perceptata, aperis en la cerbo de la ekzameno unue 冫 poste 品 kaj fine 唱. La 12-jara knabino Xiong Jie de la urbo Wuhan (Vuhan) faris provon. Oni metis en ŝian dekstran oreilon dufoje falditan paperpecon, kaj post unu minuto ŝi diris: "Venas informo!" Ŝi skribis unue 宀 poste 畚, 予 kaj fine

formis la vorton 舒, kaj poste ŝi diris, ke ŝi perceptis ankoraŭ alian vorton, kaj formis 服 kunmetante 艮 kaj 月. Fine ŝi eldiris la du vortojn. Por fari ĉion tion, ŝi uzis ĉ. kvin minutojn. Ankaŭ ŝia provo konfirmis la konstatojn de Wang Chu k. a.

Pli interesaj estas la fenomenoj interkomunika perceptado kaj teleperceptado. La fratinoj Wang Qiang kaj Wang Bin estas interkomunikaj perceptantoj plej frue trovitaj. Se unu el ili tenas skribaĵon sub akselo kaj kuntuŝiĝas kun la alia, ili ambaŭ povas ĝuste eldiri la skribaĵon. Poste ĵurnalista Zhou Wenbin de la ĵurnalo Guangming (Lumo) kaj verkisto de popularsciencaj legajoj Xiao Jianheng de la provinco Jiangsu (Giangsu) unufoje sukcesis teleperceptigi la fratinojn Wang. La fratinoj staris je ĉ. unu metro unu for de la alia, kaj unu povis percepti la skribaĵon tenatan sub akselo de la alia. Post tio Chen Shouliang kaj aliaj starigis la fratinojn je 2.30 metroj unu for de la alia por fari teleperceptadon. Ĉi-foje la fratinoj estis metitaj al ekzameno de teleperceptado antaŭ pli ol 300 homoj en la Scienca Halo de Shanghai. Kaj ĉiuj rigardantoj estis forte mirigitaj.

Pro la supraj fenomenoj multaj sciencistoj opiniis, ke eble troviĝas eksterordinara funkcio de iuj homaj korpopartoj por ricevi, transmissii, trakti kaj reaperigi bildojn. Kio estas ilia informa transportilo? Eble ĝi povas kaj ricevi kaj elsendi? Dum la simpozio oni esploris per aparatoj la orelojn, fingrojn kaj aliajn korpopartojn de la ekzamenoj kaj trovis iajn neordinarajn elektromagnetajn ondojn, kiujn elsendis tiuj korpopartoj dum la

ekzamenatoj sin streĉis por percepti. Kvankam tio estis nur unuapaŝa eksperimento, tamen ĝi vidigis al ni, kiel alloga tute nova scienca kampo kaŝiĝas post ĝi.

Antaŭe iuj opiniis, ke tian kapablon posedas nur tre malmultaj infanoj. Sed la disertajo de Chen Shouliang, Wang Chu kaj aliaj montris, ke tia kapablo estas certagrade universala inter la gejunuloj kaj geknaboj. Ili faris provojn al 40 10-jaruloj neelektitaj kaj rimarkis, ke 16 el ili posedas tian kapablon. Ili konjektis, ke tia kapablo estas latentia fiziologia funkcio ankoraŭ ne malkovrita. Estas mirinde, ke dum la simpozio oni rimarkis, ke tri knabinoj, kiuj ludis kaj faris provojn kune kun tiuj ekzamenatoj, kapablas percepti objektojn kaj distingi kolorojn per fingroj. Do efektive estas ebleco de ekzisto de tia latentia funkcio.

Antaŭe iuj opiniis, ke tia funkcio ĉe tre malmultaj infanoj iom post iom perdiĝas kun kresko de ilia aĝo. Sed la simpozio montris, ke se tia kapablo estas konstante uzata, ĝi povas daŭri longe kaj pli kaj pli fortiĝi. Ekzemple, oni jam rimarkis tian kapablon de Mou Fengqin de Huanan-gubernio, Heilongjiang (Hejlongjiang)-provinco, kiam

ŝi estis 13-jara. En la sekvantaj pli ol dek jaroj ŝi ofte ĝin prezentis. Nun ŝi aĝas jam 25 jarojn kaj havas du infanojn, tamen ŝi ankoraŭ povas tre lerte percepti objektojn kaj distingi kolorojn per siaj pojnjoj kaj aliaj korpopartoj. Kiam oni rimarkis en aprilo de la lasta jaro, ke la 11-jara knabo Xie Zhaohui posedas tian kapablon, li povis percepti nur simplajn ideogramojn kaj bildojn. Sed post milfoja provado kaj ekzercado, li jam povas percepti unufoje 28-ideograman poemon el Tang-dinastio kaj komplikan desegnon de poŝtmarko. Komence de la simpozio kelkaj ekzamenatoj havis nefortan perceptan kapablon. Ĉiutage ili sin ekzercadis, kaj ĉe la fino de la simpozio ilia perceptivo plifortiĝis.

Ekde aprilo de la lasta jaro, laborantoj el la Anhui-a Normala Instituto, la dependa hospitalo de la Hubei-a Ĉin-medicina Instituto, la Jiamusi-a Medicina Instituto kaj la Aerarmea Instituto pri Aviada Medicino komencis studi pri tiu nova temo. Poste ankaŭ iuj el la Beijing-a Universitato, la Beijing-a Normala Instituto, la Wuhan-a Universitato, la Wuhan-a Medicina Instituto, la Lanzhou-a Universitato kaj la

Chongqing-a Universitato sin okupas pri tiu afero. Personoj de ĉinaj sciencaj rondoj montris, ke se tiu temo estos pritraktata plue, ne nur gravaj novaj sukcesoj estos atingitaj kaj nova teorio kaj nova doktrino kreiĝos en la fundamentaj sciencoj, biologio, fiziko kaj biofiziko, sed ankaŭ skuego okazos al la aplikataj teknikoj kaj sciencoj, kaj la biologio, mikroelektroniko, duonkondukila scienco kaj informadiko interkruciĝos kaj intermiksiĝos, kaj bioniko (animalimitado), medicino kaj aliaj sciencoj ekhavas novajn kampojn. Tial prof. Li Baoshi, vicrektoro de la Dua Armea Medicina Instituto, prof. Wu Xueyu, estro de la okula-orela-nazagorĝa hospitalo de la Shanghai-a Unua Medicina Instituto, kaj prof. Chen Hankui, vicprezidanto de la Shanghai-a Elektroteknika Asocio, montris unuanime en sia parolo, ke la eltrovo de la eksterordinara funkcio de la homa korpo estas grava afero por la ĉinaj sciencistoj, kaj pli granda forto estas urĝe bezonata por pli profunda plurfaka studo pri tiu plej nova temo de la modernaj sciencoj kaj teknikoj; tuj kiam akiriĝos sukceso ĉirilate, ĝi donos novajn enhavojn al la modernaj fiziologio kaj fiziko.



En la ĉina mita romano "La Pilgrimado al la Okcidento" la Simio-reĝo Sun Wukong estas aminda heroo. Por meti lin sub sian regadon la insidema Ĉiela Imperiestro faris al li kaj trompadon kaj subpremadon. Sed, spitante la plej superan aŭtoritaton de la Ĉiela Imperiestro, Sun Wukong brave faris bataladon sagacan kaj interesan. Kiel li batalis kaj kia estas la rezulto? Bonvole legu la bildlibron

## RIBELO KONTRAŬ LA ĈIELA PALACO

88Es-157P

180 × 207 mm,

84 bildpaĝoj

Prezo: £0.80 US\$1.50

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la loka peranto aŭ ĉe la ĝenerala distribuanto.





## ARTA FESTIVALO DE KAMPARANOJ

Pli ol 270 amatoroj-artistoj venintaj el la kamparo de 13 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj prezentis en Beijing (Pekino) malgrandajn teatraĵojn, popolajn dancojn kaj kantojn, ĉjujojn kaj muzikaĵojn, kiuj havas varian enhavon, klaran lokan stilon kaj estas plenaj de vivetoso. Tiuj programeroj montris profundan ŝanĝigon de la socia vivo kaj prosperecon de la arta aktivado en nia kamparo.

## PREMIITAJ PORINFANAJ VERKOJ

Antaŭ nelonge la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popolo por Defendi Infanojn kaj aliaj 7 institucioj faris juĝadon al pli ol 1,000 porinfanaj literaturaj kaj artaj verkoj aperintaj post la fondiĝo de la popola respubliko, el kiuj 212 estis premiitaj. Honora premio estis donita al "Ĉifonfiguro kaj Aliaj Fabeloj" de Ye Shengtao, "Malgranda Oranĝlanterno" de Xie Bingxin, "Ĉu Vi Scias, Kiu Mi Estas" de Gao Shiqi, "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" de Wan Laiming kaj "Elektitaj Fabeloj de Andersen" ĉinigitaj de Ye Junjian (Cicio Mar). La unuaklasa premio estis donita al la verkoj "Infanoj ĉe Marbordo", "Soldateto Zhang Ga", "Ora Litorino", "Ranidoj Serĉas Sian Pannon" kaj "Astero".

## 14-JARA VIOLONISTINO GAJNIS LA UNUAN LOKON

Dum la koncerto "Printempo de Shanghai" ĉijare, oni okazigis Fortepianan Invitan Konkurson de 9 Grandaj Urboj kaj la 14-jara Mao Chengfei gajnis la unuan lokon. Ŝi ludis ĉinan muzikaĵon "Lotusa Danco" kaj "Sonato en A Majora" de Franz Schubert. Oni laŭdis ŝin pro la natureco, senafekteco, belsoneco kaj lerteco de ŝia ludado. Ŝi ne devenas de muzikista familio, ŝiaj gepatroj ambaŭ estas instruistoj de mezlernejo.



## Tridimensiaj fotoj de antikvaĵoj

La Ĉina Antikvaĵa Eldonejo, la Limigita Eldona Kompanio San Lian de Xianggang (Hongkongo) kaj la Limigita Arta Kompanio Yi Yuan Jing Hua de Xianggang kune faris cent kolorajn tridimensiajn fotojn de ĉinaj antikvaĵoj. La fotoj prezentas antikvajn ceramikaĵojn, bronzaĵojn, orajojn, arĝentaĵojn, jadajn skulptaĵojn, lakitajn objektojn kaj similajn valorajn artaĵojn

de Ĉinio. Tiuj valoregaj antikvaĵoj estas elektitaj el ĉinaj muzeoj.



Tiuj fotoj estas faritaj per aŭtomata monolensa tridimensia fotilo. Eksponante filmon, la obturatoro de la fotilo fulmorapide moviĝis de unu flanko al alia, dum la travidebla paralela striita plato tralasis la lumon sur la filmon. Poste oni algluis sur la rivelitan filmon suprediritan striitan platon, kaj la

foto povas doni tridimensian bildon kun granda versimileco.

Tiuj estis la unuaj tridimensiaj fotoj faritaj pri ĉinaj antikvaĵoj. Ili vidigos al pli multaj fremdlandanoj la valoregajn antikvaĵojn de Ĉinio.

La koloraj fotoj estis ekspoziciitaj en Beijing. La Limigita Arta Kompanio Yi Yuan Jing Hua komencis produkti tiajn fotojn pogrande por distribui al la tuta mondo.

*Ŝipoforma gutigilo por ĉina-inka frotujo, produktita de la ceramika bakforno Longquan, en la 12-a jarcento*





Plantido (Skulptajo)

de CHEN ZUOFANG

# *Restoracioj de brogita kaj*



Manĝado de brogita ŝafajo



Samovaro por brogi ŝafviandon kaj al-mangĝaĵoj



# rostita ŝafajo



Rostita ŝafajo



Rostita ŝaffemurajo kun aparta gusto



Porti al klientoj  
viandpecojn



Unu el la restoracioj de  
brogita ŝafajo en Beijing

Ŝafajpecoj ju pli mal-  
dike tranĉitaj, des pli  
bonaj.



Diversaj almanĝaĵoj



Pretigi samovarojn

# Brogita ŝafajo de Beijing



*Frاندado de brogita ŝafajo*

**T**ROVIGAS en Beijing (Pekino) dekoj da restoracioj de brogita ŝafajo. En frosta vintro, kiam neĝas, Beijing-anoj ofte sidas ĉirkaŭ hejtataj kuiraj samovaroj metitaj sur la manĝotabloj en restoracioj por ĝui la nomitan pladon. La bolanta akvo kaj forte brulanta ligno-karbo en la samovaroj havigas al ili varmon kaj vivecon.

La brogita ŝafajo de Beijing estas plado fama tra la mondo pro sia originala ĉina islama gusto kaj aparta manĝmaniero. Via apetito estas tuj vekita, kiam vi ekvidas pecojn de freŝa ŝafajo en la pladoj. La kuirmaniero estas jena: preni per manĝbastonetoj ŝafajpecon, ĝin meti en la bolantan supon de la kuirasamovaro, ĝin skueti en la supo por kelkaj sekundoj kaj poste ĝin eligi por spici kaj manĝi.

Tia plado havas tre longan historion. En Ĉinio ŝafajo estas simbolo de feliĉo. Ŝafajo estas unu el la ŝatataj manĝaĵoj de la ĉina popolo de la antikveco. Jam en historia verko antaŭ 2,000 jaroj la ŝafajo estis enlistigita kiel unu el la ok plej bonaj pladoj. Kaj ĉe la mezo de la 17-a jarcento ŝafajo kuirita per samovaro estis enkondukita en festenon de la imperiestra palaco.

La restoracio Donglaishun fondita en 1903 estas la plej fama el tiaj restoracioj en Beijing. Ĝi situas ĉe Wangfujing-strato, komerca centro de la urbo. La majstroj de la restoracio tre atentis lerni teknikon de la antaŭuloj kaj progresigis sian teknikon tranĉi viandon kaj kunaranĝi spicojn. Post 1940 Donglaishun fariĝis la plej granda restoracio de brogita ŝafajo de Beijing. Dum la lastaj jaroj ĝi akceptis gastojn de pli ol 100 landoj kaj regionoj kaj ricevis iliajn laŭdojn.

La domo de la restoracio estas trietaĝa. Sur la unua etaĝo loĝas ordinara islama manĝejo, kaj sur la dua kaj tria estas manĝejoj por brogita ŝafajo, kiuj povas akcepti samtempe 500 gastojn.

La lertaj tranĉistoj povas tranĉi unu-kilograman viandpecon en 120 pecojn tre maldikajn kun longeco de 20 centimetroj kaj larĝeco de 5 centimetroj. Tiaj pecoj ne nur aspektas bele, sed, pli grave, ankaŭ povas fariĝi bongustaĵo post momenta bolkuirado.

Mi rigardis tranĉadon de majstro He Fengqing. Li laboris en tiu restoracio jam 38 jarojn. Dum tranĉado li premas la

viandon per la maldekstra mano kaj tenas la tranĉilon per la dekstra. Mi vidis, ke li tre rapide distranĉas la viandon en pecojn movante tranĉilon kiel segilon. Li diris al mi, ke tia lerteco ne povas esti akirita sen trejnado 3-5-jara.

La restoracio Donglaishun donis atenton ne nur al tranĉado de la viando, sed ankaŭ al elekto de ŝafajo. La ŝafajo uzitaj de la restoracio por fari la pladon estas transportitaj el la malproksima urbo Jining de la Interna Mongolio. Kaj la plej bona estas kastrita virŝafajo kun pezo de 20-30 kilogramoj, ĉar tia ŝafajo estas delikata, grasa, sen forta malagrabra odoro, kaj plej taŭga por esti brogita.

Cetere, la restoracio havas diversajn specojn de spicoj, kiel sezama saŭco, Shaoxing-vino, fermentinta toŭfuo, peklita poreca floro, sojo, kapsika oleo, salikoka saŭco, vinagro kaj pecetoj da ajlo kaj bazilio. Tiujn saŭcojn kaj spicojn oni metas aparte en bovleton aŭ telereton kaj manĝantoj povas preni ilin laŭ sia plaĉo. Kaj krome, la pladon akompanas ankaŭ la konfitita ajlo, pecoj de brasikfolioj kaj vermiceloj el verdaj faboj.



Por pli bongustigi la pladon, la restoracio uzas speciale faritan sojon bonodoran kaj bongustan kaj salikokan saŭcon, faman spicaĵon produktitan de Hebei-provinco, kiu donas intensan aromon kaj kune kun la funga supo ĝuigas la manĝantojn. Ankaŭ la konfita aĵo estas preparita de la restoracio mem. En rikolta sezono de aĵo, la restoracio sendas aĉeti freŝajn aĵojn en kamparo. Oni pekligas ĝin per sukero, osmanto k. a. Kaj la konfita aĵo kun blanka koloro estas delikata, dolĉa, bongusta kaj nutroriĉa, kaj

povas forigi malagrablan odoron de ŝafviando.

Laŭ mia sperto, prenante tian pladon oni preferu manĝi samtempe aroman sezam-kukon. Oni ne devas longe bolkuiri la viandpecojn, alie ili fariĝus malmolaj. Poste oni povas boligi pecojn de brasikfolioj kaj vermiĉeloj el verdaj faboj.

Antaŭ la Liberiĝo troviĝis en Beijing nur kelkaj restoracioj de brogita ŝafajo. Sed nun estas multaj tiaj restoracioj, kaj la urbanoj povas preni tian pladon en proksima loko. Kaj krome

oni povas mem prepari tion hejme.

Antaŭ nelonge la ses pladoj de la restoracio Donglaishun, nome brogita ŝafajo, rostita ŝafajo, sale fritita ŝafajo, fritita ŝafajo kun fistuloso, fritita ŝafvosto kaj serio de rostitaj ŝafviandaj pecoj, estis filmitaj de raportisto de japana televida stacio kaj metitaj en ĝian programeron "Mondo de Bongustajoj". Tiu japana amiko diris, ke la brogita ŝafajo de Beijing kaj aliaj famaj pladoj estos diskonigitaj al Japanio kaj la tuta mondo pere de la programero.

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Hefei, ĉefurbo de la provinco Anhui
2. Hainan-insulo
3. Yangzhou, urbo de la provinco Jiangsu
4. Chengdu, ĉefurbo de la provinco Sichuan
5. Baotou de la Interna Mongolio



(Daŭrigo de p. 45)

en la malantaŭa parto de la parietaloj. La Maba-homo de Guangdong-provinco havis sagoforman kreston sur la verto, nealtan nazon kaj elstarajn zigomojn. Ĉiuj tiuj trajtoj pruvis, ke ekzistas simileco inter la ĉinaj prahomoj.

La homaro evoluis en malfruajn saĝajn homojn antaŭ 40,000 jaroj. Ili fariĝis preskaŭ samaspektaj kiel la nunaj homoj. La gravaj kraniaj fosilioj tiutempe eltrovitaj en Ĉinio estas tiuj de Liujiang-homoj kaj montsupraj kaverno-homoj. La montsupraj kaverno-homoj vivis antaŭ 18,000 jaroj. Ili estis tre kapablaj kaj scipovis ne nur ĉasi sed ankaŭ fiŝkapti. Oni trovis oston de tinko en montsupra kaverno kelkdek metrojn super fluejo. Laŭ la longeco de ĝia ostoj, oni supozis, ke ĝi longis du futojn. Oni trovis en la kaverno ankaŭ kudrilon el ostoj. Tio montras, ke la kaverno-homoj scipovis fari veston el felo. La altigo de produktivo ebligis al ili bonigi kaj beligi sian vivon. En la kaverno oni trovis apud kranioj, nemalmultajn ornamaĵojn el malgrandaj rulŝtonoj kaj bestaj dentoj truitaj.

Krome oni eltrovis ankaŭ en aliaj lokoj de Ĉinio fosiliojn de homoj kaj proksimaj parencoj de la homoj, tamen la prahistoriaj objektoj malkovritaj estas ne sufiĉe abundaj, tial oni malmulte scias la produktadon de ĉinaj prahomoj. Kun la disvolviĝo de la ekonomia konstruado de Ĉinio, pli kaj pli multiĝas terfosaj laboroj kaj oni povos malkovri pli da materialo pri prahomoj. Tio certe utilos al la studo pri la origino kaj evoluo de la homaro kaj al pli profunda kaj pli multa konado de la prahistorio de Ĉinio.



## Sukcesis operacio por amputi parazitan kapon

Kampano en la provinco Yunnan (Junnan) de Ĉinio havis parazitan kapon sur sia dekstra vango. Ĝi estis fortranĉita en hospitalo de la urbo Kunming. En medicino oni nomas tian fenomenon du strangaj fetoj kunligitaj sur kapo.

La parazita kapo havas kap-hararojn, 12 dentojn kaj ne plenkreskintajn okulojn, buŝon, nazon kaj okulharojn. La kranio havas strukturon saman kiel tiu de ordinara homo, enfermante senutilan encefalon kun grandeco de kokovo. Tia medicina fenomeno estas tre malofta. Dum la pasintaj pli ol 30 jaroj estis tri tiaj kazoj raportitaj en ĵurnaloj de aliaj landoj, sed neniu el la tri parazitaj kapoj havis organojn tiel perfektajn kiel la supre dirita.

La paciento estas 35-jara montvilaĝano nomata Zhang Ziping, kiu loĝas 273 kilometrojn nordoriente de Kunming. La operacion faris ĉefe Wang Damei, profesorino de la Beijing-a Medicina Instituto, kaj Li Bingquan, vicestro de la neŭrologia sekcio de la Kunming-a Medicina Instituto. La paciento estis rimarkita de Wang Damei, kiam ŝi estis kolektanta materialojn en tiu loko por sia verko. La ŝtato pagis por la paciento la tutan kurackoston. Zhang Ziping tre ĝojis post fortranĉo de la parazita kapo kaj mangestis al aliaj por montri sian deziron edziĝi.

## Blanknaĝila delfeno

Vivas en Changjiang (Jangzi)-rivero, la unua granda rivero de Ĉinio, tre rara animalo — blanknaĝila delfeno (*Lipotes vexillifer*). Komence de la kuranta jaro la Instituto pri Akva Biologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj en la urbo Wuhan (Vuhan) akiris virseksan blanknaĝilan delfenon pli ol 120 kilogramojn pezan kaj 1.5 metrojn longan. La esploristoj donis al ĝi belan nomon Qiqi (rara jado). Nun Qiqi ĝuas agrablan vivon en speciala baseno.

La blanknaĝila delfeno estas unu el la kvar specoj de delfenoj en la mondo vivantaj nun en nesala akvo. En la pratempo ĝi estis mamulo vivanta sur tero. Poste ĝi alutimiĝis al la vivo en akvo. Tiuspecaj animaloj, tre malmultaj en nombro, vivas nun nur en la meza kaj malsupra Changjiang-rivero kaj estas difinitaj de la ŝtato kiel la ĉefaj protektindaj animaloj.

La blanknaĝila delfeno similas fiŝon en formo, sed ne havas brankojn. Ĝi spiras per pulmoj. Inter la nunaj delfenoj ĝi estas unu el la plej primitivaj. Ĝi ludas certan rolon por studi la animalan evoluigon. Ĝiaj propraj organoj de son-produktado kaj son-akcepto

vekis intereson ĉe bio'logoj kaj akustikistoj.

## Plado de vivanta karpo

En la Somera Palaco de Beijing (Pekino) oni komencis iujn servojn por turistoj, kiel “fotografado en antikvaj vestoj” kaj “plado de vivanta karpo”.

En la korto de la restoracio Tingliguan troviĝas vitra baseno kun fontano. Tie naĝas oraj kaj nigraj karpoj. Se turistoj volas iun ajn el la karpoj, ili povas mem ĝin kapti per reto kaj transdoni al kuiristo por kuiri. La lasta tuj metas la baraktantan karpon sur haktabulon, tre rapide ĝin preparas al kuirado, poste fritas ĝin kaj surŝutas al ĝi saŭcon jam pretigitan. La kuirado daŭras malpli ol kvar minutojn. Kiam la plado de bongusta karpo kun sukero kaj vinagro estas surtabligita, la buŝo de la karpo ankoraŭ povas fermiĝi kaj malfermiĝi kaj ĝiaj brankoj moviĝi. Tiu plado estas nomata “plado de vivanta karpo de Kunming-lago”. Ĝi vekis grandan intereson ĉe la eksterlandaj turistoj, kaj multaj el ili kun admiro fotis la fiŝon.

*En la Somera Palaco de Beijing, fremdlandaj turistoj fotas sin en vestaĵoj de antikvaj imperiestroj kaj imperiestrino.*





## LA STATUO DE ANTIKVA BONZO JIANZHEN EN ĈINIO

**E**N la sakuro-florada aprilo kaj majo, la “nacia trezoro” de Japanio — la statuo de la ĉina Tang-dinastia bonzo Jianzhen — estis rondire elmontrata en Yangzhou kaj Beijing de Ĉinio. Tio estas granda ĝojiga afero de la popoloj de Ĉinio kaj Japanio kaj ankaŭ alia himno de amikeco. Antaŭ 1,200 jaroj, malgraŭ diversaj malfaciloj Jianzhen kaj liaj disĉiploj transveturis al Japanio, kunportante tien brilan kulturon de la prospera Tang-dinastio, kaj per tio li faris neforviŝeblan kontribuon al la kombiniĝo de la ĉina kaj japana kulturo kaj al la amika historio de la du landoj. La

elmontrado de la statuo de Jianzhen en Ĉinio havigis novan brilon al la amikeco inter la du landoj.


En 23 tagoj de la elmontrado en la du urboj pli ol 500,000 homoj rigardis la statuon. En Yangzhou, la hejmloko de Jianzhen, 170,000 homoj rigardis la statuon en 7 tagoj. En Beijing vicprezidantino Deng Yingchao tondis rubandon por la elmontra ceremonio kaj vicĉefministro Deng Xiaoping verkis artikolon por “Okaze de la Elmontrado de la Statuo de Jianzhen en Ĉinio” kaj intervidiĝis kun abato Morimoto de Toshodai-templo de Japanio, kiu eskortis la statuon

de Jianzhen al Ĉinio, kaj aliaj japanaj amikoj. La ĉina popolo bonvenigis la statuon de Jianzhen kiel lin vivan. Por akcepti la “hejmenrevenan” statuon de Jianzhen, oni riparis Daming-templon de Yangzhou kaj Fayuan-templon de Beijing por tie starigi memorhalon de Jianzhen tiel ke ambaŭ temploj kaj la budhaj statuoj en ili post kolorado kaj orado fariĝis brilaj. La popolo de Yangzhou oferis speciale al la statuo de Jianzhen lokajn manĝaĵojn kaj freŝajn fruktojn. La Ĉina Historia Muzeo reaperigis gracian stilon de Tang-dinastio en la elmontra halo. La Poŝta kaj


*Memorhalo de Jianzhen en la templo Daming de Yangzhou*



*Abato Morimoto ekbruligas la ŝtonan okangulan lanternon, kiun li donacis al la templo Daming.*







*En la 19-a de aprilo, estis oficiale montrita la statuo de bonzo Jianzhen, en la memorhalo de Jianzhen en la templo Daming de Yangzhou. Jen sceno de la inaŭguro.*



*Vicĉefministro Deng Xiaoping intervidiĝas kun abato Morimoto kaj aliaj japanaj amikoj.*

Telekomunika Ministerio emisiis memorigajn poŝtmarkojn. En Beijing sursceniĝis historia dramo "Jianzhen Transveturas al Japanio". Kien ajn la statuo de Jianzhen venis, tie ĝi estis varme bonvenigata.


Estis ekstreme kortuŝe, ke abato Morimoto dungis, per granda monsumo, faman ŝtonhakiston por fari el bonkvalita ŝtono okangulan lanternon, kiu reprezentis la kulturon de la Nara epoko. Li donacis ĝin al Daming-templo kaj eklumigis

ĝin propramane. Li ankaŭ donacis al Ĉinio unu volumon de sutro manskribita en Dunhuang kaj cent volumojn de Dazang-sutro antaŭ 1,000 jaroj, kiujn li konservis multjare. Malgraŭ sia granda aĝo de 79 jaroj, li veturis speciale al Zhaoqing de Guangdong por rigardi la monumenton de budho Yoei, unu el la japanaj disĉiploj de Jianzhen.

Intervidiĝante kun abato Morimoto kaj aliaj japanaj amikoj vicĉefministro Deng Xiao-

ping laŭdis, ke la rondira elmontrado de la statuo de Jianzhen en Ĉinio estas senprecedenca afero kaj natura rezulto de disvolviĝo de la longa historia rilato inter la du landoj. Li esperis, ke la amikeco inter la du popoloj herediĝos generacion post generacio. Abato Morimoto diris, ke la hejmenreveno de bonzo Jianzhen eklumigis alian lampon por la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio, kaj li klopodos, por ke la lampo brilu por ĉiam.

*Ekspozicio de Kalligrafio kaj Pikturo Memore al Jianzhen en Beijing*



**J**IANZHEN havis familian nomon Chunyu. Li naskiĝis en budhista familio de Jiangyang-gubernio de Yangzhou, en la jaro 688 p. K. En sia aĝo de 21 jaroj li estis incita en monaĥecon en la templo Shiji en Chang'an (nun Xi'an) kaj fariĝis budhismo-erudito. Li ne nur bone sciis budhismon, sed ankaŭ atingis altan nivelon en studo de arkitekturo, medicino kaj arto. En sia aĝo de 26 jaroj li revenis de Chang'an al Yangzhou kaj funkciis kiel abato de la temploj Longyun kaj Daming. En la postaj dekoj da jaroj li predikis en la norda parto de Jiangsu-provinco, incis pli ol 40,000 bonzojn en monaĥecon kaj li fariĝis religia gvidanto en tiu regiono.

Jianzhen vivis en la jaroj de plena prospero de Tang-dinastio. La progreso de ekonomio kaj kulturo de Tang-dinastio akcelis interfluan inter Ĉinio kaj aliaj landoj en tiuj flankoj. Tiam Japanio sin trovis en transformiĝo de la sklava socio al feŭda socio. La imperiestra domo de Japanio tre admiris la kulturon de Tang-dinastio kaj multfoje sendis delegitojn kaj grandan nombron da studentoj al Ĉinio. En la jaro 743 p. K. Jianzhen akceptis la inviton de la japanaj senditoj-bonzoj Yoei kaj Fusho kaj decidis veturi al Japanio por predikado. Dum la dek jaroj ekde 743 p. K. li kvinfoje malsuk-

cesis en la transveturado al Japanio kaj precipe en la kvina provo li trafis plej grandan malfeliĉon. Tio okazis en 748 p. K. Jianzhen kaj liaj sekvantoj sursipiĝis en Yangzhou. Ili navigis laŭ Changjiang (Jangzi)-rivero en la Orientan Ĉinan Maron, kaj tie ili renkontis grandegan tajfunon. La ŝipo floris al proksimaĵo de Zhoushan-insularo, ankris tie tri monatojn kaj poste denove ekveturis. Estis neatendite, ke ili denove renkontis ventegon. Post duonmonata flosado la ŝipo atingis la sudan parton de Hainan-insulo de Guangdong-provinco. Poste la ŝipo veturis al Leizhou-markolo kaj Jianzhen kaj liaj sekvantoj revenis al la hejmloko per la tera vojo. Pro la longa vojaĝo kaj multaj suferoj Jianzhen jam perdis vidkapablon kiam li revenis al Yangzhou. Sed tio ne ŝancelis lian firman volon. En la jaro 753 li decidis fari la sesan provon veturi al Japanio malgraŭ sia aĝo de 66 jaroj. Kune kun dekoj da siaj disĉiploj, metiistoj kaj artistoj bone konantaj inĝenieradon, arton, medicinon kaj agronomion, Jianzhen atingis Nara, la antikvan ĉefurbon de Japanio post 40-taga navigado.

Nelonge post kiam Jianzhen atingis Japanion, speciala sendito de la japana imperiestro konsolis lin kaj donis al li rajton sankcii monaĥecon. La imperiestro Shomu kaj multaj aliaj altaj bonzoj forlasis

sian malnovan monaĥecon por esti incitaj de Jianzhen en novan monaĥecon. En la jaro 756 la imperiestro nomis lin Daisodsu, donante al li senprecedencan favoron. Tiam la konservativaj fortoj de Japanio estis tre potencaj kaj la malnova religia grupo prenis Jianzhen kiel minacanton al ĝiaj interesoj kaj kalumniis lin ĉiuflanke. En tiaj maloportunaj cirkonstancoj Jianzhen ne depri-miĝis. Li kaj liaj disĉiploj konstruis la fame konatan templon Toshodai, kiu fariĝis poste grava loko por kulturi japanajn bonzojn. Eĉ nun la japanaj budhismaj rondoj prenas Jianzhen kiel la prapatron de la vinaja-skolo.

Jianzhen kondukis kulturon de Tang-dinastio al Japanio. La templo Toshodai spegulas arkitekturon de la prospera Tang-dinastio kaj estas rigardata kiel "nacia trezoro" de Japanio. La Ora Halo en la templo konstruita imite al ĉina templo kaj en nacia stilo de Japanio estas rigardata kiel la plej granda kaj plej bela konstruaĵo en la tempo de Tenpjo (719-784 p. K.) kaj perlo de la arkitekturo kaj skulpturo de tiu tempo.

Jianzhen bone sciis medicinon. Perdinte vidkapablon li distingis drogojn anstataŭe per flarado. Li lekciis pri patologio kaj farmacio kaj persone faris klinikan praktikon. Ĝis nun la japana popolo

*En la jaro 743, Jianzhen duafoje provis veturi al Japanio. Li ekveturis de la Granda Kanalo ĉe Yangzhou, poste en la maron.*

*La templo Daming de Yangzhou, kie bonzo Jianzhen akceptis la inviton de japanaj bonzoj*



prenis Jianzhen kiel la unuan enkondukanton de la ĉina medicino en Japanio.

Jianzhen predikis en Japanio uzante han-lingvajn sutrojn kaj tio multe influis la disvolviĝon de la japana fonologio. Li kunportis grandan kvanton da sutroj kaj libroj manskribitaj de Tang-anoj, inter kiuj estis unu ekzemplero de "Veraj Skribaĵoj de Wang Youjun"


kaj tri ekzempleroj de "Veraj Skribaĵoj de Wang Xianzhi", kiuj havis grandan influon al la kaligrafio de Japanio.

Jianzhen vivis preskaŭ dek jarojn en Japanio kaj mortis je la 21-a de junio de 763. Li estis multe respektata pro tio, ke li decidis sian tutan vivon al la amikeco kaj kultura interŝanĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.




Por memori pri Jianzhen, liaj disĉiploj faris lian statuon antaŭ lia morto per lako miksitita kun ramiĵaj fibroj laŭ la metodo de Tang-dinastio. La statuo kun afabla mieno kaj sidanta pozo altas je 84 centimetroj. La japana popolo rigardas ĝin kiel "nacian trezoron". Ĝi bone konserviĝis en la templo Toshodai dum la pasintaj pli ol 1,200 jaroj kaj estas kultata de la japana popolo.

## KARIKATURO

Artikolo tro longa,  
tempo nesufiĉa!




Pentrita de MAO MINGSAN




Kapite!

Pentrita de LIU YUZHEN



Pandido kaj knabineto  
Pentrita de SUN YIZENG





# KION MI VIDIS EN LA FRENEZULEJO ANDING?

de HONG YING

**N**IAJ legantoj el Jugoslavio, Svedio kaj Japanio petis nian raporton pri niaj kuracado kaj flegado al nervaj malsanuloj. Por plenumi ilian peton, komisiite de nia redakcio, mi vizitis la frenezulejon Anding, unu el la hospitaloj por psikaj malsanuloj en Beijing.

La hospitalo situas en la norda antaŭurbo de Beijing. Ĝia direktoro Zhang Jizhi konigis al mi la hospitalon. Ĝi establiĝis en 1950, kaj havas 400 malsanulajn litojn (30 kromajn por infanoj) kaj 420 medicinistojn. La hospitalo estas projektita kaj konstruita laŭ la specialaj postuloj de kuraco al psikaj malsanuloj. Krom sufiĉaj ekipaĵoj la hospitalo havas ankaŭ sufiĉe komfortan medion. Montrante al mi la korton ekster la fenestro, li diris: "Tiu ĉi larĝa korto estas promenejo por malsanuloj, kie ili povas fari gimnastikojn kaj aliajn sportajn ekzercojn. Apud la malsanula ĉambro de ĉiu etaĝo estas malgranda manĝejo kaj amuzejo por malsanuloj."

Neniam antaŭe mi kontaktis kun psika malsanulo, kaj havis timon kiam mi kaj direktoro Zhang ekiris al malsanuloj. Sed ekster mia atendo, la malsanuloj estis kvietaj. Mi vidis, ke ili, kiel sanaj homoj, faras diversajn sportajn ekzercojn kaj amuzojn aŭ ĝoje interparolas. Kiam ili vidis nin, ili ĝentile kapsignis al ni kun rideto. En iu ĉambro de malsanulinoj, ni vidis aron da junulinoj kantantaj. Inter ili troviĝis fraŭlino nomata Shen Li, kiu kantis belsone kelkajn kantojn en varma manklakado. Direktoro Zhang demandis min mallaŭtigante sian voĉon: "Ĉu vi povas ekkoni, ke ili estas psikaj malsanuloj?" Mi kapneis. Li diris, ke ili resaniĝas post kuracado de certa tempo. Vere, ĉe la unua rigardo, ili, kvietaj kaj bonorde vestitaj, neniom diferencis de sanaj homoj. Nur per zorga rigardo oni povis trovi, ke iuj el ili estas malspritaj kaj stultaj. Mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron kaj trovis, ke la fenestroj, planko kaj koridoro estas sufiĉe bone purigitaj kaj la litaĵoj bonorde metitaj. Elirinte el

la ĉambro, ni venis en amuzejon, kie oni instalas unu televidilon, unu radioricevilon, gazetojn kaj jurnalonojn. Kelkaj malsanuloj estis ludantaj tie ĉinajn ŝakojn.

Psikozo estas unu el la multaj sociaj malsanoj de Ĉinio. Kio estas kaŭzoj de la malsano? Iu medicinisto sciigis min pri kelkaj oftaj kaŭzoj.

La kaŭzoj de psikozo estas tre diversaj, ekzemple malharmonio de familio, malsukceso en amo, malagrablajoj en vivo kaj laboro . . . Ni prenu 25-jaran Liu Dongsheng kiel ekzemplon. Li laboris en iu meĥanika lernejo. Antaŭ du jaroj li enamiĝis al iu knabino, sed ŝia patrino malkonsentis tion. Kaj iom poste, ankaŭ la knabino rifuzis lian amon. Kaj pro tio li estis frapita de skizofrenio. Ankaŭ hazardaj akcidentoj aŭ morto de parencoj estas tre oftaj kaŭzoj. Sun Yanqing, kiu ĵus atingis la 19-an jaron, perdis sian patrinon en la 14-jara aĝo. Poste ŝi estis turmentata de sia duonpatrino kaj sekve ŝia psiko fariĝis anormala. Krome, ankaŭ heredeco, naturaj katastrofoj kaj teruraj okazaĵoj povas kaŭzi psikozon. Sed, malsanuloj de la hospitalo, kiuj suferas pro tiuj ĉi kaŭzoj, estas nemultaj.

Medicinisto diris al mi ankaŭ, ke la aĝo de la malsanuloj ĝenerale estas inter 20 kaj 40 jaroj. Laŭ klinika observado, rimarkinda reakcia psikozo estas kaŭzita rekte de drasta psika doloro



*Kuracado per elektra akupunkturo*

kaj incito. Ĉiuj supre diritaj kaŭzoj estas de tiu kategorio. La komuna karaktero de tiuj malsanuloj estas ke la kvalito de ilia cerbo estas malforta.

Inter la metodoj de kuraco de psika malsano, ankaŭ psika kuracado kaj zorgema flegado en vivo estas tre efikaj. Yuan Zhiju, kiu bone konas psikozon, diris, ke psika kuracado estas pli grava ol tiu per medikamentoj. Tial en frenezulejoj kuracistoj estas tre multaj. Ĉiuj agoj de malsanuloj, ĉu ellitiĝo, manĝo, vestado, aŭ medikamentoprenado, amuzado, endormiĝo, estas prizorgataj de flegistoj. Ne estas pli facile flegi psikan malsanulon ol trijaran infanon. Se malsanuloj perdis apetiton post kiam ili ricevis elektran ŝokon, elektran akupunkturaron aŭ insulinan injekton, flegistoj manĝigas ilin. Iuj gravaj malsanuloj ĵus venintaj al la hospitalo troviĝis en senkonscio kaj iliaj fekado kaj pisado perturbiĝis, flegistoj do zorge flegis ilin kun devoscio kaj simpatio, sen ajna abomeno al ili.

Diference de ĉiuj aliaj hospitaloj, la kuracistoj kaj flegistoj de la nomita hospitalo ne nur devas posedi sciojn pri kuracado kaj flegado, sed ankaŭ devas ofte observi psikon de la malsanuloj. Laŭ la reguloj de la hospitalo kuracistoj devas ĉiutage interparoli unufoje kun malsanuloj por solvi ilian mensan problemon. Tio estas nomata psika kuracado. La geflegistoj ĉiutage interparolas, amuziĝas kaj vivas kune kun ili. La malsanuloj volantas verŝi al ili kion ili pensas. Tial ili fariĝis nemalhaveblaj helpantoj por la kuracistoj en ilia psika kuracado.

Malsanulino Wang Shuyuan raportis al mi, kiel intime flegis-



*D-ro Yuan Zhiju interparolas kun malsanulino.*

tinioj zorgis kaj flegis ŝin. Ŝi estis muzika instruistino de la 142-a Mezlernejo. Kiam ŝi enhospitaliĝis en decembro, 1979, ŝi estis apatia al ĉio kaj ofte staris sole apude. Se oni parolis iom mallaŭte, ŝi suspektis, ke ili preparolas kontraŭ ŝi. Ŝi montris tedon pri la vivo kaj ofte diris, ke ŝi volas sin mortigi. Post medikamenta kuracado ŝi reakiris iom da konscio. Sed kiam ŝi sciigis, ke ŝi fariĝis psika malsanulino, ŝi tute deprimiĝis, nenium alparolis kaj dronis en melankolio. Flegistino Zhang Jiawen entuziasme aliradis al ŝi. Kiam ŝi informiĝis, ke la malsano de Wang Shuyuan estas kaŭzita de insultado fare de ŝiaj instruatoj, ŝi iris al la lernantoj. Sub ŝia helpo la lastaj konsciis sian kulpon kaj venis al la hospitalo por peti de ŝi pardonon. Tio multe konsolis Wang Shuyuan. Krome, ŝi informiĝis ankaŭ, ke Wang Shuyuan estas iom ambicia, kaj ŝi do difinis ŝin kiel direktantinon de amuzado, por ke ŝi instruu al aliaj kanton. Ŝi pli kaj pli revigliĝis kaj sereniĝis kaj ŝia sanstato multe pliboniĝis.

En la hospitalo malsano de 95% de la pacientoj estas moderigita pro komforta medio kaj efikaj medikamenta kaj psika kuracadoj. Kiam psikaj malsanuloj tute resaniĝis, preskaŭ

ĉiuj el ili povas reveni al sia antaŭa laboro. Kiam ili elhospitaliĝas, kuracistoj sciigas al iliaj familianoj kaj gvidantoj de la koncernaj unuoj pri la sanstato kaj atentindaĵoj por la pacientoj, por ke ili bone zorgu la resaniĝintojn en la ĉiutaga vivo. Se la vivo estas trankvila, la fru-periodaj malsanuloj eble ne plu estos trafitaj de psikozo. Sed por ordinaraj malsanuloj la ebleco de remalsaniĝo estas pli granda. Plejparte, se oni eliminas la kaŭzojn de la malsano, remalsaniĝo estas evitebla kaj la sanstato stabiliĝos post unu aŭ du jaroj.

La hospitalo ĉiutage akceptas 200-300 pacientojn ĉe kliniko. Tiaj hospitaloj troviĝas en ĉiuj provincoj kaj grandaj urboj. Por faciligi kuracadon al psikaj malsanuloj psikiatroj de iuj lokoj vizitas malsanulojn en ilia hejmo, kunportante medikamentojn. Sub la helpo de civila administracio kaj higiena departemento en iuj grandaj urboj, ekz. Shanghai, Tianjin, ekfunkciis labora kaj kuraca grupo por psikaj malsanuloj. Ĝi organizas la malsanulojn en laboro laŭ iliaj sanstato, korpokvalito kaj sekso, kaj respondecas pri observado, preskribado kaj injektado al la pacientoj. Tia faro estas bonvena por la malsanuloj kaj iliaj familianoj.



# BAOTOU—ŜTALA URBO SUR LA STEPO

de NAN YUJIE kaj ZHU GUO

**L**EGENDO diras, ke antaŭ tre longe, kiam mongoloj paŝtis sur Ulanqab-stepo, subite ili vidis en tre malproksima ĉielo inversan konturon de urbo, en kiu multis altaj domegoj kaj svarmis homamasoj. Ili tre miris ne sciante, kio okazis. Maljunuloj diris, ke ĝi estas urbo konstruita de la ĉiela dio kun liaj soldatoj por la stepo.

Tiu legendo vive esprimis la deziron de la mongola popolo al feliĉo dum centoj kaj miloj da jaroj.

Nun la legendo jam turniĝis en realon: La ŝtala urbo Baotou aperis en la sudokcidenta parto de Ulanqab-stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Tamen, ĝi estas konstruita ne de ĉielaj soldatoj, sed de ĉinaj diversnaciecaj popoloj.

Ĉiuj vizitantoj al Baotou ne povas ne admiri la grandiozecon de la ŝtala urbo. Norde de ĝi kuŝas la montoj Monni-ula kaj Daqing kaj sude de ĝi fluas Huanghe (Flava Rivero). Antaŭ la montoj staras fornegoj kaj Martin-fornegoj, el kiuj tagnokte torentas fero kaj ŝtalo. La in-

terkruciĝantaj glataj avenuoj interligas ĉiujn partojn de la urbo. La gigantaj modernaj maŝinoj ekspluatadas kun granda bruo subteran trezoron.


Kian aspekton havis Baotou antaŭ la Liberiĝo?

En la mongola lingvo Baotou signifas lokon kun cervoj. Oni diras, ke antaŭe en la areo de Baotou kreskis primitivaj arbaroj kaj flustris fontoj, aro kaj aro da cervoj venis tien por nutri sin. Poste, tie aperis kelkaj loĝpunktoj kaj fariĝis vilaĝo Baotou, kiu plue disvolviĝis en urbeton. Antaŭ 100 jaroj formiĝis la urbo Baotou. Tamen en la malnova socio ĝi disvolviĝis tre malrapide kaj antaŭ la Liberiĝo en la urbo troviĝis nur 7 fabrikoj, 40 strataj lampoj kaj 60 apudvojaj arboj. Ĉie videblis kavoj de malpura akvo kaj ruboj. Tiam Baotou estis grava loko por imperiistoj, feŭdaj burokratoj, bienuloj kaj komercistoj en ilia subpremado al la diversnaciecaj popoloj de la Interna Mongolio. Pro manko de industrio la urbo Baotou ne povis produkti feraĵojn kaj eĉ ĉiutagaj industriaj vivbezonaĵoj


devis esti transportataj de aliloke. Ili terure altigis la prezon de la industriaj produktaĵoj: Oni povis ŝanĝi tri bovfeleojn kontraŭ nur 10 metroj da ŝtofo kaj unu ŝaffelon kontraŭ nur unu skatoleto da alumetoj. Tiam, kiel forte la mongola popolo deziris havi sian propran industrion.

Baotou havas bonajn kondiĉojn por disvolvi industrion. Tie abundas subtera trezoro. Sur la vasta stepo norde de Baotou sin trovas granda monto Bain Obo kun alteco de 1,783 metroj super la marnivelo. En la sunlumo ĝi brilas blanke, brune kaj indige. Bain Obo estas mongolaj vortoj kiuj signifas trezororiĉan monton. Prospektado montris, ke en ĝi estas granda mino kun diversaspecaj metaloj. La konservokvanto de fero superas 900 milionojn da tunoj kaj sufiĉas por pli-ol-200-jara fandado fare de fera-ŝtala fabriko kun jara produktokvanto de 3 milionoj da tunoj. La minajo entenas 114 specojn de mineraloj el 71 elementoj, inter kiuj 26 specoj povas esti sinteze utiligitaj. Estas tre rimarkinda

*Unu el la stratoj de Baotou*




*Artefarita lago en la parko Mulin*





*La fera fabriko de la Baotou-a Fera-Ŝtala Kompanio*



la konservokvanto de rarera metalo de lantano, niobo kaj torio. La najbara karbominejo Shiguai havas riĉan bonkvalitan karbon taŭgan por fari koakson kaj produkti elektron. Kaj krome en la montoj Daqing kaj Monni-ula estas asbesto, glimo, fluorspatoj kaj varmrezista tero. En la lastaj jaroj oni trovis ankaŭ orminajon. Sed antaŭe tiuj trezoroj kuŝis senutile subtere.

En 1949 Baotou estis liberigita. De tiam ĝi rapide kreskis kiel junulo vigeplena. Ankaŭ en la dua printempo post la fondiĝo de la nova Ĉinio koncerna fako sendis tien geologian taĉmenton por prospektado. En aŭgusto de 1953 la unua grupo de konstruantoj de la Baotou-a Fera-Ŝtala Kompanio venis al la vasta stepo, kaj tiel komenciĝis la uverturo de la konstruado. Frumatene de la 26-a de septembro, 1959, la unua ferlikvaĵo elfluis el la fornego n-ro 1 de la Baotou-a Fera-Ŝtala Kompanio. Ĉefministro Zhou Enlai (Ĝoŭ Enlai) tondis la rubandon ĉe la inaŭgura ceremonio. En la sekvanta jaro la Martin-fornego n-ro 1 de la kompanio ekproduktis ŝtalon.

Nun la Baotou-a Fera-Ŝtala Kompanio jam fariĝis unu el la

grandaj feraj-ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio. Ĝi produktas 70 specojn de ŝtalo kaj 30 specojn de ŝtalmaterialoj. Per siaj produktajoj la kompanio provizas 20 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn de la tuta lando. Post la esplorado de 20 jaroj la vastaj amasoj de laboristoj kaj teknikistoj de la kompanio fundamente posedis la teknikojn pri elektado kaj fاندado de minajo konformajn al la leĝoj de tieaj riĉfontoj. Tio malfermis la vojon por laŭplane utiligi ilin. Estonte, la kompanio liveros al la moderniga konstruado ne nur pli multe da bonkvalitaj ŝtalo, fero kaj ŝtalaj materialoj, sed ankaŭ grandan kvanton da multekostaj neferaj metaloj.

En akompano al la konstruado de la kompanio, stariĝis en Baotou fabrikoj de brikoj, betono kaj aliaj konstruaj materialoj. Ekfunkciis ankaŭ fabrikoj de maŝinfarado, manĝaĵoj, kemia industrio, tekstilo, ledaĵoj, sukeraĵoj, paperfarado kaj medikamentoj. Nun en la urbo troviĝas 900 grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj. La totala produktovaloro de industrio en 1979 estis pli-ol-200-oblo de tiu en la komenca periodo

post la Liberiĝo. Ĝiaj ŝtalaj materialoj, maŝinoj, vivbezonaĵoj, porcelanaĵoj, ledaĵoj, feloj kaj tapiŝoj estas vendataj en 40 landoj kaj regionoj de la mondo kaj laŭdataj de la eksterlandaj uzantoj.

Ankaŭ trafikado en la urbo disvolviĝis rapide. Post la Liberiĝo estis konstruitaj kvar fervojoj: unu kondukas al la minejo de Bain Obo, alia al la karbominejo Shiguai, la tria al Beijing kaj la kvara al Lanzhou, la ĉefurbo de la provinco Gansu. Antaŭ la Liberiĝo multaj homoj provis veturi per vaporŝipoj kaj barĝoj en la tiea parto de Huanghe, sed malsukcesis. Hodiaŭ la urbo Baotou jam fariĝis centro de fervoja, ŝosea, aera kaj rivera trafiko de la regiono.

Samtempe progresas la kultura afero kaj ekonomia konstruado de tiu urbo. Antaŭ la Liberiĝo en la urbo sin trovis nur du mezlernejoj. Sed nun estas 400 mezlernejoj kaj 4 altaj lernejoj, kie lernas multaj mongolaj gejunuloj. Kaj krome ankaŭ ekfunkciis multaj sciencaj institucioj. Dank' al la kultivado de la Partio kaj registaro iuj el la mongolaj kadroj fariĝis inĝenieroj, fabrikestroj aŭ direktoroj de kompanioj.

# Fosilioj de prahomoj eltrovitaj en Ĉinio

de WU XINZHI



Restarigita figuro  
de Pekin-homo



HISTORIAJ OBJEKTOJ

ĈINIO estas lando de longa ekzistado kaj havas skriban historion de pli ol 3,000 jaroj. Malkovritaj restadejoj de prahomoj montris, ke homoj aperis en sudorienta Azio almenaŭ antaŭ 1,700,000 jaroj. Pri ili atestas fosilioj de dentoj de Yuanmou-homoj kaj iliaj ŝtonaj objektoj.

Printempe de 1965 tri ĉinaj geologoj venis esplori formaciojn


en la gubernio Yuanmou, Yunnan (Junnan)-provinco, por kolekti materialojn pri sisma prognozo. Ili trovis du prahomajn incizivojn sur monteto en Yuanmou-baseno. Poste esploristoj de la Instituto pri Pravertebruloj kaj Prahomoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj plurfoje faris fosadon kaj elfosis tri ŝtonajn objektojn kaj multajn fosiliojn de bestoj. Laŭ paleomagnetisma mezurado, la Yuanmou-homoj vivis antaŭ 1,700,000 jaroj, kaj la eltrovo de tiuj fosilioj plifruigis la ekzistan periodon de la ĉinaj prahomoj je 1,200,000 jaroj.

Poste oni eltrovis fosiliojn de Lantian-homoj. Lantian situas 39 kilometrojn sudoriente de la ĉina antikva ĉefurbo Xi'an (Hi'an). En la jaroj 1963 kaj 1964 oni

malkovris fosiliajn mandiblon kaj kranion de tiuj homoj en Chenjiawozi kaj Gongwangling. Laŭ ekspertizo, tiu eltrovita en Chenjiawozi apartenis al homoj vivantaj antaŭ 530,000-650,000 jaroj; kaj tiu en Gongwangling, antaŭ 750,000-1,000,000 jaroj. La Lantian-homo havis malgrandan kranion kun kapacito de nur 780 mililitroj, malpli ol 2/3 de tiu de la nuna homo. Li havis tre dikan kranion kun alta superorbita kresto.

La idoj de Lantian-homoj estis la mondfamaj Pekin-homoj trovitaj ĉe Zhoukoudian, 48 kilometrojn sudokcidente de la urbo Beijing (Pekino). Antaŭe tie estis vilaĝeto produktanta kalkon. La vilaĝanoj dehakis kalkŝtonojn apud la vilaĝo por prepari kalkon kaj kelkfoje

## ELTROVEJOJ DE FOSILIAJ PRAHOMOJ DE ĈINIO



22 〇 猿人 33 □ 古人 24 ● 新人 35 〇 周口古猿及西灰古猿 36 〇 巨猿 37 〇 南方古猿

- |                                      |                 |
|--------------------------------------|-----------------|
| 1 Beijing                            | 18 Tongzi       |
| 2 Jianping                           | 19 Yuanmou      |
| 3 Xujiayao                           | 20 Lufeng       |
| 4 Zhoukoudian                        | 21 Chenggong    |
| 5 Zhiyu                              | 22 Xiaolongtan  |
| 6 Wushen                             | 23 Xichou       |
| 7 Dingcun                            | 24 Bama         |
| 8 Dali                               | 25 Liucheng     |
| 9 Lantian                            | 26 Liujiang     |
| 10 Yunxi                             | 27 Lipu         |
| 11 Nanzhao                           | 28 Maba         |
| 12 Yunhian                           | 29 Daxin        |
| 13 Xintai                            | 30 Wuming       |
| 14 Ziyang                            | 31 Tainan       |
| 15 Jianshi                           | 32 Simio-homo   |
| 16 Changyang                         | 33 frua homo    |
| 17 Jiande                            | 34 malfrua homo |
| 35 Rama-simiohomo kaj Siva-simiohomo |                 |
| 36 giganta simiohomo                 |                 |
| 37 aŭstraloida simiohomo             |                 |
| 38 Insularoj en la Suda Ĉina Maro    |                 |

eltrovis fosiliojn de animaloj en kalkŝtonoj. En 1921 venis al tiu loko Anderson, svedo laboranta kiel mina konsilanto de la ĉina registaro. Informiĝinte pri la eltrovo de fosilioj, li sendis iujn tien por prifosado. Poste multaj fakuloj faris prifosadon kaj esploradon en tiu loko. En 1929 la ĉina paleoantropologo Pei Wen-zhong eltrovis tie pli ol 40 fosiliojn de simio-homoj, vivintaj antaŭ 500,000 jaroj, ĉ. 20,000 pecojn de ŝtonaj instrumentoj kaj postsignojn de fajrouzado. La krania kapacito de Pekin-homo, meznombre 1,088 mililitroj, estas pli granda ol tiu de Lantian-homo, tamen egalas nur 3/4 de tiu de la nuna homo. La Pekin-homo havis malaltan vereton, platan frunton, altan superorbitan kreston kaj elstarantan buŝon. Tiaj trajtoj similas al tiuj de simio. Estas certe, ke la Pekin-homoj ne estas simioj, ĉar ili scipovis fari instrumentojn kaj uzi fajron. Tio konfirmis la doktrinon de Darvino pri evoluo de simio al homo. En 1871 la angla natursciencisto Darvino pruvis per multaj nerektaj atestaĵoj, ke la homo evoluis el la simio de la terciaro. En 1891 la nederlanda medicina oficiro Dubois trovis, en Javo de Indonezio, fosilion de rektestara simio-homo, kies krania formo similas kaj al tiu de homo kaj al tiu de simio, sed li ne trovis instrumenton en tiu sama loko. Oni opinias, ĝenerale, ke homo estas animalo, kiu povoscias fari instrumentojn, tial multaj natursciencistoj ne akceptis tian aserton, ke la supre dirita simio-homo estas prahomo, ne simio. Sed post la eltrovo de Pekin-homo ili agnoskis ke simio-homo konsistigas gravan eron de la homa evoluo.

Laŭ la restaĵoj trovitaj en la kaverno de Pekin-homoj ni povas imagi ke tiam la virinoj kolektas sovaĝajn fruktojn en la ĉirkaŭaĵo kaj viroj ĉasas bestojn en malproksimo. Cervoj estis iliaj grandaj ĉasaĵoj. Pri tio atestas fosilioj de miloj da cervoj, kiujn ili portis en

la kavernon. La cervoj estis bongustaj sed malofte akireblaj por ili, ĉar la ostoj de tiom da cervoj estis akumulitaj de ili dum pli ol 200,000 jaroj. La Pekin-homoj havis tre malaltajn produktajn fortojn. Dum la ĉasado de bestoj aŭ kolektado de fruktoj ili trafis kelkfoje ĉasaĵojn lasitajn de rabobestoj post manĝado kaj prenis ilin en la kavernon, kie ili tenis brulantan fajron, kaj ilin rostis. La fajro estis tre utila por ili, ĝi estis uzata ankaŭ por varmigo en vintro. Per ĝi ili lumigis la kavernon kaj tenis ĝian sekecon por la sano de homoj.

Nia kono pri la morfologio de la homo dum tiu periodo venas ĉefe de la fosilioj de Pekin-homoj. Sed bedaŭrinde, tiuj valoregaj objektoj perdiĝis, ĉirkaŭ la Evento de la Perla Haveno, el la manoj de kelkaj usonanoj, tiam prizorgantaj tiujn fosiliojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĉinaj sciencistoj refoje eltrovis en Zhoukoudian fosiliojn de kranioj, dentoj kaj ostoj de membroj. Kaj tiuj fosilioj fariĝis pli valoraj pro la perdiĝo de la unuaj.


Esplorinte la Pekin-homon, la usona sciencisto Weidenreich prezentis serion da trajtoj de la Pekin-homo similaj al tiuj de la nunaj mongolidoj kaj asertis, ke la Pekin-homo estas praavo de la nunaj mongolidoj. Multaj sciencistoj dubis pri kaj oponis al lia opinio, ĉefe pro tio ke mankis fosiliaj atestaĵoj, kiuj povas montri la interligon de ili.

Tamen per eltrovo de homaj fosilioj ĉinaj sciencistoj ne nur konfirmis lian aserton, sed ankaŭ certigis, ke la praavoj de la mongolidoj vivis antaŭ 1,700,000 jaroj.

Aparte gravaj inter tiuj fosilioj estas kraniaj fosilioj de Dali-homoj eltrovitaj en la jaro 1978. Ili estas sendifektaj. La Dali-homoj ekzistis en periodo post la rektaj homoj, t.e. en la periodo de la fruaj saĝaj homoj antaŭ 150,000-200,000 jaroj. Tiaj sendifektaj



*Kranio de Dali-homo de Shaanxi trovita en 1978*



*Kranio de Pekin-homo trovita en 1966*

homaj fosilioj pratempaj estas maloftaj en la mondo. La Dali-homo, preskaŭ same kiel la Pekin-homo, havis kranian oston 1-3-oble tiom dika kiom tiu de la nuna homo. La superorbita kresto de la antaŭa estas eĉ pli dika ol tiu de la lasta. Lia krania kapacito estas ĉ. 1,120 mililitroj. La trajtoj de la Dali-homo similas kaj al tiuj de la Pekin-homo kaj al tiuj de la nuna homo. Ekzemple lia vizaĝa ostoj estas relative malgranda kaj ne akre konvekso. Li havas ankaŭ trajtojn similajn al tiuj de la fosiliaj homoj en aliaj lokoj de nia lando kaj al tiuj de la nuna mongolido. Ekzemple sur la meza parto de lia verto troviĝas sagitala kresto, liaj vangoj kaj vangostoj estas iom konveksaj kaj lia nazo nealta. Inter liaj parietaloj kaj okcipitalo estas malgranda triangula Inka-osto. Tiuj trajtoj ne nur interligas lin kun la Pekin-homo, la fosiliaj homoj en aliaj lokoj de Ĉinio kaj la nuna mongolido, sed ankaŭ diferencigas lin disde la alilokaj prahomoj en la sama periodo kaj montras, ke li reprezentas unu el la homaj rasoj.

La Xujiayao-homo kaj la Dingcun-homo estas idoj de la Dali-homo, eble ili ĉiuj surhavis Inka-oston, ĉar troviĝas kavo supre  
(Daŭrigo sur p. 34)



## ESPERANTO-EKSPOZICIO KUN MULTAJ VIZITANTOJ

De la 23-a de majo ĝis la 2-a de junio okazis en Beijing Esperanto-ekspozicio vizitita de pli ol 14,000 personoj. Kun granda intereso esperantistoj kaj urbanoj de Beijing rigardis la ekspozicion. Post rigardo de ĝi, la lernantoj kaj instruistoj de la dua Esperanto-kurso de la Beijing-a Lingva Instituto skribis en la vizitlibro: "La enhavo de la ekspozicio estas riĉa. Ĝi donis al ni pli da kono kaj intereso pri Esperanto, kaj ni decidis pli diligente ĝin lerni kaj nin dediĉi por ĝin disvastigi." Iu lernanto de elementa lernejo skribis: "La ekspozicio forte tiras mian koron. Post mia hejmvveno mi petos helpon de mia patro por fari lernoplanon de Esperanto." Krome nombro da alilokanoj kaj eksterlandaj turistoj vizitis ĝin kun intereso. Japana studento lernanta en Ĉinio skribis: "Mi esperas, ke en la estonteco oni disvolvos kulturalan interŝanĝon inter diversaj landoj pere de Esperanto."

*En la Esperanto-Ekspozicio*



## K-DO YE JUNJIAN GASTIS ĈE JEL

En marto k-do Tibor Sekelj, reprezentanto de la Jugoslavia Esperanto-Ligo, vizitis Ĉinion, invitate de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj je la 20-a de majo la lasta sendis k-don Ye Junjian, membron de la Konstanta Konsilantaro de la ligo kaj faman verkiston, al Jugoslavio por semajna vizito. Dum la vizitado li estis varme kaj amike akceptata de JEL kaj jugoslavaj esperantistoj. K-do Ye interŝanĝis opiniojn pri la E-movado de ambaŭ landoj, kun gvidantoj de JEL k-doĵ Petar Vukomanović kaj Peter Zlatnar kaj aliaj famaj esperantistoj, kaj samtempe li donis intervjuon al raportistoj de televida stacio kaj ĵurnalo, faris prelegojn, ĉeestis kunsidojn k.a. Lia vizito akcelos la kunlaboron inter la esperantistoj de la du landoj.

## LA ESPERANTO-LIGOJ DE BEIJING KAJ ANHUI EN PREPARADO

En junio fondiĝis la Prepara Grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo. La grupestro estas Ge Baoquan, fama tradukisto kaj esploristo pri fremdlanda literaturo kaj

la vicestroj Jin Ziguang, dramisto kaj membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, Wang Jihua, vicdirektoro de la Eldonejo de Ĉina Enciklopedio kaj Zeng Heyao, vicdirektoro de la Elektroenerĝia Eldonejo. La kongreso por fondi la ligon okazos en la lasta duonjaro.

Ankaŭ la Prepara Grupo de la Anhui-a Esperanto-Ligo naskiĝis en majo. Ĝiaj respondeculoj estas Zhu Shiquan, Lu Shengyuan kaj Yu Guojian. Nun ili starigis Esperanto-kursojn en Bengbu kaj Huainan.

## APERIS "VERDA STEPO"

Lastatempe Esperanto-grupo de la urbo Huhhot fondis sian bultenon "Verda Stepo" kiel lernilon. Je la 20-a de majo ekfunkciis la mezgrada Esperanto-kurso fondita de la Scienca kaj Teknologia Asocio kaj la Esperanto-Asocio de la Interna Mongolio. Koncernaj respondeculoj Zhou Beifeng, Wang Zaitian, Yang Lingde, Wu Daping, Uliĉ kaj aliaj ĉeestis la inaŭguron kaj esprimis al ĝi sian varman gratulon. La kurso havas 80 lernantojn. La Televida Stacio de la Interna Mongolio raportis pri la inaŭguro. Krome la Radio de la Interna Mongolio disaŭdigis, dufoje en la 27-a de majo, la paroladon pri Esperanto fare de Mi Jisheng, vicprezidanto de la Esperanto-asocio.

Antaŭ nelonge la Aŭstralia Esperanto-Asocio komisiis sinjorinon Horniman, kiu vizitis la regionon, sendi al la asocio nombron da esperantaj libroj kaj gazetoj kiel donacajojn. Respondeculoj de la asocio Xiang Quanshen kaj Zhang Naijun intervidiĝis kun la gastino kaj reciprokis donacajojn. La televida stacio ankaŭ raportis pri la intervidiĝo.



*Lernantoj de la Esperanta kurso de Bengbu en la provinco Anhui*



*Lernantoj de la dua Esperanto-kurso de la Beijing-a Lingva Instituto, antaŭ la ekspoziciejo*

### ESPERANTO EN SCIENCA FIKCIO

Antaŭ nelonge la Popola Eldonejo de Henan-provinco aperigis infanan legaĵon "Kosmospaco Vokas Vin" verkita de Tan Yingwu. En la fikcio Esperanto fariĝis ne nur la komuna lingvo de la homaro, sed ankaŭ "la voĉo de la terглоbo" ligiĝanta kun homoj de alia planedo. Gvidate de kosmonaŭto kelkaj geknaboj flugis al la kosma spaco. Ili vizitis miraklan kosmourbon. Venkinte multajn obstaklojn ili neatendite intervidiĝis kun aliplanedanoj. En la libro troviĝas kelkloke dialogoj en Esperanto kun tradukaĵo en la ĉina lingvo.

### "HEJMSOPIRA STELO" EN TELEVIDADO

Je la 15-a de junio la Ĉina Centra Televido prezentis la unuan koloran televidan filmon "Hejmsopira Stelo" kune faritan de japanoj kaj ĉinoj. Ĝi multe interesis la rigardantojn. La titolo de la filmo estis manskribita de vicĉefministro Deng Xiaoping de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio. Depost majo ĉinaj ĉefaj ĵurnaloj "Renmin Ribao", "Guangming Ribao", "Beijing Ribao", "Beijing Wanbao" kaj aliaj multe raportis pri la japana esperantistino Verda Majo, la heroino en la filmo.

### LA DUA ESPERANTO-KURSO EN LA BEIJING-A LINGVA INSTITUTO

En majo la nomita instituto ekfunkciigis la duan Esperanto-kurson kun 57 studentoj de la fremdlingva fakultato. La kurso ricevis subtenon de Qiu Ji, membro de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL kaj vicdirektoro de la instituto, kaj de la Prepara Grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo. Ĝin gvidas Li Weilun, instruisto de la nomita fakultato.

### EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ EN BEIJING

En aprilo kaj majo venis al nia ĉefurbo esperantistoj s-ro R. Harling el Usono, s-ro Errol Chick el Aŭstralio, s-ro J. Farrand el Britio kaj s-ro T. Edvardsen el Norvegio. Esperantistoj de Beijing kaj laborantoj de la redakcio de El Popola Ĉinio havis agrablan interparoladon kun ili.

### AŬSTRIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

De la 5-a ĝis la 8-a de sept., okazos la Aŭstria Esperantista Renkontiĝo en la urbo Steyr. Ĝi aktivados en la kadro de multaj festaraĝoj okaze de la 1,000-jara jubileo de tiu urbo. La programo estos enhavoriĉa.

### BIBLIOGRAFIO DE SCIENCAJ ARTIKOLOJ

Por prilaborata bibliografio de sciencaj artikoloj en Esperanto ĉiuspecajn revuojn, periodaĵojn kaj kolektojn de sciencaj artikoloj en Esperanto serĉas: Edward Wojtakowski, P. O. kesto 312, PL 50-950 WROCLAW 2, Pollando.

### INTERNACIA KONKURSO DE INFANAJ LITERATURAĴOJ

La nomita konkurso estas organizita de la Esperanto-klubo "Bialystok", B. Markaca 1, YU-43350 DJURDJEVAC, Jugoslavio. Ĝi enhavas originalajn verkojn en Esperanto kaj verkojn esperantigitajn el diversaj lingvoj. La konkurso daŭros ĝis la 31-a de decembro 1980. La plej bonaj verkoj estos premiitaj.

### NOVA ESPERANTO-ELDONEJO

Antaŭ nelonge fondiĝis la nova Esperanto-eldonejo Palatina kklr. Ĝi prenas sur sin la taskon eldoni librojn, gazetojn, lernomaterialojn kaj aliajn materialojn, celante al lerno kaj disvastigo de la internacia lingvo Esperanto. La adreso: Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 Elmstein, FRG.



## QAIDAM-BASENO RIĈA JE SALO

La sallagoj grandaj kaj malgrandaj en Qaidam-baseno de Qinghai-(Kinghaj)-provinco en nordokcidenta Ĉinio havas 60 miliardojn da tunoj da salo en rezervo, t.e. pli ol duono de la totala sala kapacito de Ĉinio. Tiuj lagoj entenas ankaŭ aliajn dekelkajn elementojn, kiel boro, kalio kaj litio. Qaidam en la mongola lingvo signifas salan lagon. Ĝi kun areo de ĉ. 200,000 kvadrataj kilometroj estas unu el la plej grandaj landinternaj basenoj de Ĉinio. La montregionoj ĉirkaŭe de la baseno estas riĉaj je plumbo, zinko, karbo, fero, asbesto, gipso kaj aliaj mineraloj.

## NATURA SASAFRASARO ELTROVITA EN ĈINIO

Antaŭ nelonge laborantoj pri arbara scienco de Fujian (Fugian)-provinco de Ĉinio eltrovis en la provinco maloftan naturan sasafrasaron (*Pseudosassafras laxiflora*) kun areo de pli ol 600 hektaroj. La sasafrasoj estas plejparte mezaĝaj aŭ maturaĝaj. Travivinte tiel multajn jarojn, ili restas ankoraŭ prosperaj.

La sasafraso estas speciala produktaĵo de Ĉinio kaj ankaŭ unu el la raraj arbospecioj de la mondo. Ĝi estas larĝfolia arbo kun rekta trunko. Ĝia ligno, malmola, belvejna kaj imuna kontraŭ malsekeco, korodo kaj formoŝanĝo, servas kiel speciala materialo por konstrui domojn kaj fari ŝipojn kaj luksajn meblojn.

## PLIMULTIĜO DE ĈINAJ ŜOSEOJ

Dum la lastaj du jaroj Ĉinio plilongigis la trunkajn ŝoseojn je

2,500 kilometroj kaj la branĉajn ŝoseojn je pli ol 50,000 kilometroj. Laŭ statistiko (ĝis la fino de la lasta jaro), la totala longeco de la ĉinaj ŝoseoj atingis 890,000 kilometrojn, 12-oble pli multe ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

## ĈINIO EKSPORTAS MAŜINAROJN

La Ĉina Landa Korporacio de Importo kaj Eksporto de Maŝinoj kaj Ekipaĵoj komencis eksporti kompletajn maŝinarojn. Tiaj ekipaĵoj eksportitaj de sept. 1979 ĝis nun inkluzivis kompletajn ekipaĵojn por fabriko de smirga tolo, malvarmigan maŝinaron por granda tekstila fabriko kaj hidroelektrajn maŝinarojn kun kapacito de 5 ĝis 750 kilovattoj.

Ĝis la fino de majo, Ĉinio jam subskribis kontraktojn pri eksporto de tiaj maŝinaroj al klientoj de Kanado, Novzelando, Filipinoj, Tajlando kaj Usono.

## 12 GRANDAJ HIDROELEK- TREJOJ KONSTRUATAJ EN ĈINIO

Laŭ la utiligebla akvoforto Ĉinio konstruos 10 grandajn hidroelektrajn bazojn kaj 12 grandajn hidroelektrejojn kun totala kapacito de pli ol 10 milionoj da kilovattoj.

La nomitaj hidroelektraj bazoj troviĝas en la supraj basenoj de Changjiang (Jangzi) - rivero kaj Huanghe-rivero kaj la basenoj de riveroj en sudokcidenta kaj orienta Ĉinio. Nun 9 gigantaj hidroelektrejoj estas en konstruado ĉe Gezouba en Hubei-provinco, Tongjiezhi en Sichuan-provinco, Wujiangdu en Guizhou-provinco, Lubuge en Yunnan-provinco, Wan'an en Jiangxi-provinco, Dahua en Guangxi, Tianshengqiao ĉe la limo inter Guizhou kaj Guangxi, Longyangxia en Qinghai-provinco kaj Wuqiangxi en Hunan-provinco. Krome, aliaj tri grandaj hidroelektrejoj estas

konstruataj ĉe Baishan, Dongjiang kaj Ankang en Jilin-, Hunan- kaj Shaanxi-provincoj.

## NOVA TEKNIKO DE ŜPINADO DISVASTIGATA EN ĈINIO

La nova tekniko de memtorda ŝpinado aperinta en la sepdekaj jaroj estas nun disvastigata en la ĉina tekstila industrio.

Hodiaŭ, granda nombro da maŝinoj de memtorda ŝpino estas fabrikita en la urboj Beijing kaj Shanghai, Liaoning-provinco, Jiangsu-provinco kaj Guangxi. Per tiaj maŝinoj oni povas produkti lanajn kaj kemifibrajn ŝpinaĵojn.

Post instalo de la novaj maŝinoj, 40-75% de la movforto povas esti ŝparitaj, dum la produktokvanto povas esti altigita 15-25-oble kaj la plankareo okupita de la ekipaĵoj estas malpliigita je 30%.

## PLENUMIĜIS LA PRODUKTO- PLANO DE ŜTALO KAJ FERRO

Ĝis la 20-a de junio, la produktoplano de la unua duonjaro de ŝtalo, ŝtalaĵoj kaj gisfero de nia lando estis plenumita. La produktokvanto de gisfero kreskis je 7.6%, tiu de ŝtalo je 10.7% kaj tiu de ŝtalaĵoj de 14.3% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

En la unuaj kvin monatoj de la kuranta jaro, oni produktis 1,790,000 tunojn da urĝe bezonataj ŝtalaĵoj por agrikulturo, malpeza industrio kaj maŝinfarado.

Laŭ raportoj de 30 ĉefaj metalurgiaj entreprenoj de nia lando, la konsumkvanto de koakso, karbo, elektro kaj mazuto por produkto de ĉiu tuno da fero aŭ ŝtalo malaltiĝis ĝis rekordaj ciferoj en la unuaj kvin monatoj. La konsumkvanto de elektro por produkto de ĉiu tuno da ŝtalo malaltiĝis je 15 kilovattoj. La kvalito de la produktitaj gisfero, ŝtalo kaj ŝtalaĵoj atingis rekordajn normojn.



FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

Sakuro

de FUSACUGU KIDO (Japanio)



Purpura krokuso (*Crocus purpureus*)  
sur la Apuanaj Alpoj de Italio  
de A. C. STAGI (Italio)






Bronza gamo-sonorilaro

## Ĉinaj antikvaj muzikiloj



Bronza homo kun glavo staranta sur framo de gamo-sonorilaro



Bronza sonorilo kun ideografiaj







Pajnoŝalmo


Estis eltrovitaj, el ĉina antikva tombo de 2,400 jaroj, pli ol 7,000 objektoj inkluzive de 124 muzikiloj de 8 specoj. Inter tiuj objektoj troviĝas bronza gamo-sonorilaro, sonora ŝtonplataro, pajnoŝalmo, bambuaj flutoj k. a. Tio estas senprecedenca malkovro pri la ĉina muzika historio.

La bronza gamo-sonorilaro konsistas el 64 sonoriloj pendantaj, laŭ ilia grandeco, sur trietaĝa framo. Oni konstatis post la unua esploro, ke la sonoriloj sur la supra etaĝo estas uzataj por difini tonon, tiuj sur la meza por ludi melodiojn kaj tiuj sur la malsupra por harmonii. Sur ĉiu el la sonoriloj troviĝas oraj vortoj. La sume pli ol 2,800 ideografiaj sur ili temas ĉefe pri muziko, kaj la teksto estas la plej antikva, kompare perfekta verko pri muziko de Ĉinio.

La sonora ŝtonplataro konsistas el 32 pecoj el kalkŝtono, blua ŝtono kaj jado pendantaj sur duetaĝa bronza framo laŭ ilia grandeco.

La pajnoŝalmo estas unuafoje trovita en Ĉinio. Ĝi konsistas el 13 bambuaj tuboj, kiuj estas ligitaj kun 3 transversaj bambupecoj. Kiam ĝi estis ĵus elterigita, ĝi ankoraŭ povis produkti pli ol 5 tonojn.

Sonora ŝtonplataro





815 W

